GRUPPO ESPERANTISTA MILANESE
ex Casello Dazio Porta Venezia (lato Giardini)

JĀNIS RAINIS

AMO ESTAS PLI FORTA OL MORTO

TRAGEDIO DE „TURAIDAS MAIJA“
EN KVIN AKTOJ

LATVA ESPERANTO-SOCIETO

JĀNIS RAINIS

AMO ESTAS PLI FORTA OL MORTO

TRAGEDIO DE „TURAIDAS MAIJA“ EN KVIN AKTOJ

Kun afabla permeso de la aŭtoro
el latva lingvo tradukis
INTS ČAČE

La Esperantan tekston trarigardis
TALIVALDS INDRA
diplomita instruisto de Esperanto

RIGA LATVIO 1933

LATVA ESPERANTO-SOCIETO

La libron presis Latvia ŝtata monpresejo en 2000 ekzempleroj, de kiuj 1001 ekzempleroj estas numeritaj kaj signitaj per aŭtografo de la tradukinto. Ankaŭ kliŝoj kaj vojkarto de „Livlanda Svisio“ estas preparitaj en la sama presejo. Papero estas de paperfabriko Ligate (66 kilometrojn de Latvia ĉefurbo — Riga).

LA LIBRON MI TUTKORE DEDIĈAS
AL TUTMONDA GEJUNULARO

La tradukinto

Nav valoda kā valoda tikai viena,
Ta dvēsele vē, kas organismu sien.
Un kad ta vienas visus pasaules,
Ta pirma palma būs, kas mieru nes.

Aspazija

Traduko:

Ne lingvon nur la lingvo prezentigas,
Animo estas ĝi, kaj korpon ligas.
Kaj kiam ligos ĝi la tutan mondon,
Ĝi estos palm', portanta pacan ondon!

Aspazija



J. Rainis

Portreto de Rainis — pentraĵo de J. R. Tillbergs (1926)
Troviĝas en Riga urba artmuzeo

A N T A Ŭ P A R O L O

Ĉe la Balta maro, sur la limo inter orienta kaj okcidenta Eŭropo, kuŝas la lando kaj vivas la popolo, kies ano estis la aŭtoro de tiu ĉi tragedio. Lando ĉi tiu estas Latvio kaj la popolo — latva.

Kvankam latva popolo estas jam tre malnova, kun antikva kaj alta kulturo, tamen Latvio, kiel memstara regno, estas proklamita nur la 18. novembro 1918. Ĝis tiam nur apartaj ĝiaj regionoj dum kelke da tempo estis memstaraj, sed precipe en la lastaj 700 jaroj ĝi apartenis al diversaj landoj, fine al Rusio.

Laŭ la konstitucio Latvio estas suverena demokrata respubliko. Ĝi troviĝas en la mezo de tiel nomataj Baltaj landoj. Norde de Latvio estas Estonio, oriente — Rusio, sude — Polio kaj Litovio, sed okcidente — Balta maro kaj Riga golfo. Teritorio de Latvio okupas 65.791,4 kvadratajn kilometrojn. Ĝia loĝantaro estas 1,9 milionojn granda.

La ĉefurbo de Latvio estas Riga. La lando havas tri gravajn havenojn — Riga, Ventspils kaj Liepaja, kaj en la lando estas multaj belegaj ĉirkaŭaĵoj, *banlokoj kaj saniglokoj. Plej belegajn* ĉirkaŭaĵojn havas Sigulda, Krimulda, Turaida kaj Koknese, kun siaj malnovaj ruinoj, rokoj, kavernoj kaj grotoj, kiuj ĉiusomere allogas amason da ekskursantoj. Plej konataj banlokoj estas Riga Marbordo (Lielupe, Bulduri, Avoti, Dzintari, Majori, Dubulti, Jaundubulti, Melluži, Asari, Valteri), Ogre kaj Sigulda, sed plej bonaj saniglokoj — Ķemeri, Baldone kaj Kandava, kun siaj famaj sulfuraj fontoj.

Aŭtoro de ĉi tiu tragedio Jānis Rainis (Pliekšans) naskiĝis la 11. septembro 1865. proksime ĉe suda limo de tiu ĉi lando, en Varslavani, kie liaj gepatroj farmis bienon Tadenava. Fininte mezlernejon en Riga, li studis en Peterburga universitato, kies juran fakultaton li finis en 1887. Kelkan tempon li oficis en Vilna distrikta juĝejo. Poste li laboris kiel advokato en Jelgava (Latvio).

Sian literaturan agadon li komencis jam en mezlernejo, verkante originalan teatraĵon „Vanems Imanta“ kaj tradukante tragedion de la rusa poeto A. S. Puŝkin „Boriso Godunov“. En la sama mezlerneja tempo li multe legis en originalaj lingvoj verkojn

de famaj rusaj, germanaj, francaj kaj anglaj aŭtoroj kaj studis latvajn popolkantojn. La samon li daŭrigis ankaŭ studante en universitato, kaj en 1888. li aperigis sian unuan libron — „Apdziedāšanās dziesmas III. latviešu dziesmu svētkiem" („Kantmilitaj kantoj al III latva kantofesto") sub la pseŭdonimo — Jans Jasenu Plikšis. Samjare aperis lia unua kolekto de satiraĵoj „Etaj ojstroj".

De la jaro 1891—1895 li en Riga redaktis progreseman latvan gazeton „Jaunā Dienas Lapa" („La nova taggazeto"). Gvidante la gazeton, li propagandis novajn por tiu tempo socialajn ideojn.



La domo en bieno Tadenava — naskiĝloko de la aŭtoro
Desegnaĵo de S. Vidbergs

Dum ĉi tiu tempo li konatiĝis ankaŭ kun jam rekonita latva verkistino Aspazija (Elza Rozenbergs), kiu poste iĝis lia edzino. Forirante en la jaro 1895. de gvidado de la gazeto, li denove volis labori kiel advokato, sed rusa administracio ne donis plu la permeson, ĉar li tiutempe estis jam konata kiel revoluciulo, al rusa regno politike malfidinda persono. Ĉirkaŭ tri monatojn kun Aspazio li pasigis en Berlino, sed post la reveno en Latvion, en 1897., rusa administracio lin arestis kaj ekzilis en nordorientan regionon de Eŭropa Ruslando — Vjatka gubernio. De tie li revenis Latvion nur en 1903. jam kiel vaste rekonita poeto kaj majstra tradukinto de „Faŭsto" kaj alia klasika literaturo. Samjare aperis lia unua versaĵaro „Malproksimaj resonoj

en blua vespero", kiu estis kvazaŭ ensonorigo al la nova epoko de latva literaturo. Tiun sekvis, sub la antaŭsento de unua Ruslanda ribelo, fama latva tragedio „Fajro kaj nokto" kaj la dua versaĵaro — „Ventega semado", kiu vere estis ventega kaj semis en la popolo revolucian semon.

Dum la rusa revolucio en 1905., kiam ankaŭ latvoj provis forskui ĉenojn de carismo kaj nobelaro, ankaŭ li, Rainis, estis inter la gvidantoj de revoluciuloj, kiel unu el fondintoj de Socialdemokrata laborista partio en Latvio, kies ano li restis ĝis la morto. Ribelo tamen ne sukcesis. Caraj servutuloj subpremis ĝin kaj komencis torturi kaj mortigi la unuajn batalantojn por libereco. Rainis kaj Aspazio devis forlasi Latvion. Ili fuĝis eksterlanden, kie, en Kastanjola, apud Lugano, Svislando, ili pasigis longajn propravolajn ekzilajn jarojn, kreante siajn plej famajn verkojn.

Kiam Latvio estis proklamita kiel memstara regno, Rainis kun Aspazio en 1920. revenis de memekzilo hejmen. Post la reveno en Latvion, li laboris ne nur kiel verkisto, poeto, sed estis ankaŭ parlamentano kaj okupis postenojn de nacia teatra direktoro kaj de kleriga ministro. Oni intencis proponi lin ankaŭ kiel kandidaton al literatura premio de Nobel. Sed subita lia morto vanigis ĉi tiun intencon. Li mortis la 12. septembro 1929. en la urbo — Riga Marbordo.

Literatura heredaĵo de Rainis estas tre granda. Multaj versaĵaroj, kiel: „Malproksimaj resonoj en blua vespero", „Ventega semado", „Fino kaj komenco",*) „Ave sol", „Tiuj, kiuj neforgesas", kaj teatraĵoj, kiel: „Fajro kaj nokto" (tradukita francen), „Indulis kaj Arija", „Josefo kaj liaj fratoj" (tradukita en multajn lingvojn), „Ludis mi kaj dancis", „La ora ĉevalo" (tradukita en kelkajn lingvojn) k. t. p. estas famaj kaj neforgeseblaj verkoj, kiuj daŭre vivos ankoraŭ post morto de la aŭtoro.

Riga, 1933 K. Leiškalns

---

*) Kiel simpatiano por Esperanto, Rainis metis en tiu ĉi kolekto al la versaĵo „La vigla vivo" la maksimon esperantlingve „En ago venko nia".

Ĝoj. cento Ints Ĉaĉer kunp!

Sav. ĉam Ints. kunpo vedotl. kunj. ireantu
meni ebleant tuĉkt esperant vabodo mam
kupu. Mi la respondi prawi! Ar prakka dend
Ints ar ĉi. ĉapum un kiom pegundnt. kad
mam kiĝ prawdiŝan esperant!

Vi. ĉi. ĉamj ar un kiŝ. labdzam

28.9.27 Ints Rainis

Letero de la aŭtoro J. Rainis, per kiu li permesas al Ints Ĉaĉe traduki la tragedion esperante

E N K O N D U K O

Antaŭ proksimume 30 jaroj mi loĝis inter kamparanoj. Dum longaj kaj ofte tro enuaj vintraj vesperoj oni kutimis rakonti siajn travivaĵojn, solvi enigmojn kaj ankaŭ citi spritajn popoldiraĵojn. Sed iu maljuna grizhara onklino foje rakontis belan legendon pri „Turaidas Roze" („Rozo de Túraida"). La rakonto tiom plaĉis al ĉiuj, ke kelkajn tagojn poste oni petis ŝin rerakonti ĝin kun ĉiuj detaloj. Kaj oni denove ekaŭdis pri ĉarma Maija kaj pri ŝia amata fianĉo, pri mirindaj valoj de Gaŭja, pri altaj krutaj rokoj, pri diabla kaverno, pri Bonvira groto, kun ĝia nesekiĝanta fonteto, kaj pri la apuda, belornamita groto de Maija, kie, laŭ rakonto de la onklino, Maija estis murdita. Same ŝi rakontis, ke fianĉo de Maija estis terure torturita... Kvankam, finante sian rakonton, ŝi konfirmis, ke ĉio rakontita estas fakto — vera okazintaĵo, tamen ne ĉiuj kredis kaj longe oni ankoraŭ sidis kapbalancante kaj pridiskutante la aŭditaĵon. Sed en mia infana animo restis certa konvinko, ke ĉio aŭdita pri Maija estas vero. Kaj mi firme decidis: ĉe okazo nepre vidi la vortepentritajn lokojn propraokule kaj surloke konvinkiĝi pri vereco de la rakonto...

Jaroj venis kaj pasis. La pitoreskajn kaj vere historiajn lokojn kun ĝiaj mutaj atestantoj — ruinoj mi vizitis multfoje, jen grupe — dum ekskursoj, jen aparte — pasigante miajn somerajn forpermesojn, — sed la fakto pri iama reala ekzistado de Maija tamen restis por mi granda nesolvebla enigmo...

Kaj jen feliĉo! En 1926. poeto Rainis venas kun efektiva malkovraĵo pri Maija kaj dokumente pruvas la fakton, forigante por ĉiam la nubojn el la brila oreolo de Maija. Sur bazo de la dokumentoj trovitaj, li verkas sian tiom interesan tragedion „Mīla stiprāka par nāvi" („Amo estas pli forta ol morto").

Post apero de la libro mi tuj ekplanis pri ĝia tradukado, celante nur unu: konigi la kortuŝan fakton ankaŭ al miaj amikoj-samideanoj, kiel lokaj, same alilandaj, tiom pli, ke al la enhavo estas donita formo de altvalora literatura verko.

Do — vi, karaj gelegantoj de la libro, eksciu nun pri la granda ideala kaj senfina amo de Maija al Heil, kaj same pri mia amo al ĉi tiu verko, kiun mi komprenigas al vi per helpo de nia kara lingvo — Esperanto.

Estu permesite al mi ĉi loke esprimi mian sinceran dankon al unua civitano de nia lando — Latvia respublika prezidanto Alberts Kviesis, same al Latvia ĉefepiskopo Dro Teodors Grīnbergs kaj ŝatata poetino Aŝpazija, pro ilia morala subteno, rilate la libron, sen kio mi ne estus kuraĝinta turni min al ceteraj eminentuloj — Esperanto amikoj.

Samgradan dankon mi ŝuldas al mia longjara ĉefo — estro de Latvia ŝtata monpresejo — profesoro Richards Zarriņš, pro lia afabla helpo por la preslaboroj, sen kio la libro ne estus akirinta nunan sufiĉe plaĉan aspekton. La samideanoj — Talivalds Indra kaj Kārlis Leiškalns akceptu mian amikecan manpremon pro iliaj multaj valoraj konsiloj kaj senlaca diversmaniera helpado, sen kiuj la libro povus esti pli multe kritikata ol nun.

Kaj fine: koran dankon ankaŭ al ĉiuj antaŭmendintoj de la libro, ĉar ili donis al mi la impulson senprokraste konduki mian laboron ĝis la feliĉa fino.

Ints Čače

Majo 1933

Pulkveža Brieža prosp. 18,
Rīgas Jūrmala — Latvijā

AMO ESTAS PLI FORTA OL MORTO

P E R S O N O J

MAIJA (elp. Majja), adoptita filino de kastela skribisto Greif.

VIKTORO HEIL (elp. Hejl), ĝardenisto en Sigulda.

ADAMO JAKUBOVSKI, standardjunkro.

SKUDRITIS, militservisto, amiko de Jakubovski.

FRIDA, kastelanino de Turaida (elp. Túrajda).

LENJO, filino de Greif.

ŜILDHELM, kasteladministranto de Turaida.

SINJORINO HEDVIGA ŜILDHELM, lia edzino.

GRENJO, drinkeja servistino.

LANDJUĜISTO.

DU ASESOROJ.

SVEDAJ OFICIROJ.

Popolanoj, soldatoj, oficiroj, fraŭlinoj, lakeoj, juĝej- kaj militservistoj.

LOKO: Kastelo de Turaida kaj Labvīrs*) groto ĉe Sigulda.

TEMPO: En unuaj tagoj de aŭgusta monato en la jaro 1620.

---

*) Labvīrs (esperante Bonviro) groto estas al popolo konata sub la nomo „Gūtmaṇa ala". En la Esperanto-teksto la groto estas ĉie nomata Bonvira groto.

Rimarko de la tradukinto

Vidzemes Šveice
ar Siguldas, Krimuldas un Turaidas pilīm

Vidzemes Šveice
ar Siguldas, Krimuldas un Turaidas pilīm



A K T O U N U A

UNUA SCENO

Maija kaj Lenjo

MAIJA (kantas mallaŭte):

Franjo mia paruet'
Venu, kantos kune ni, —
Diros mi al vi belvortojn,
Kune voĉtremados vi.

Diofiloj monton rajdis,
Hufofero fajron ĵetis,
La flameta fajrereto
Ekbruliĝis en rozuj'.

(Birdeto ĉirkaŭflugas ŝin kaj eksidas sur ŝia etendita mano.)

MAIJA (mallaŭte ridante): **Jen, jen! birdeto venas sur mian manon. — Ne venu, Lenjo, pli proksimen kaj ne moviĝu! Ĝi timas de vi.**

LENJO (dekdujara knabino, tenas ankaŭ sian maneton etendita, mallaŭte): **Cip! cip! cip! Mi tenos blankan panereton, — ĝi venos ankaŭ al mi. Cip! cip! cip! Ne venas.** (La birdeto forflugas.)

MAIJA: **La birdeto timas vin. Vi, eble, ne deziras al ĝi bonon, volas ĝin kapti. Tiam birdeto ne venas. Kreajo sentas, kiu estas bona kontraŭ ĝi.**

LENJO: **Jes, vin ja ĉiuj amas: birdetoj, katetoj, hundetoj, kaj — fraŭloj. Al ĉiuj vi diras bonan vorton, kun ĉiu vi ŝercas kaj bele kantas. Kio estis ĉi tiu kanteto kaj kiel ĝi finiĝas?**

MAIJA: **Simple, kanteto de sî mem. Sed kiu do vin, Lenjo, instruis paroli pri fraŭloj? Ŝajnas Frida? aŭ vi tion aŭdis de la servistoj?**

LENJO: **Sed vin ja ĉiuj amindumas, ne nur via Heil.**

MAIJA: **Kion vi nur ne scias, infano! — Sed nun, kiu do amas min kiel Heil?**

LENJO: **Nu jes, ne nur sole Heil, sed ankaŭ la junkro, Skudritis, oficiroj, soldatoj kaj korteganoj. Kvazaŭ vi estus ilin nutrologinta, kiel ĉi tiun birdeton.**

MAIJA: **La birdeton mi ne logis, ĝi venas libervole. Mi nur bedaŭras, ke ĉiuj deziras ĝin kapti kaj malliberigi kaj teni ĝin por si. Ĉu la birdeto ne havas sian vivon? Ĉu ĝi ne volas vivi? Ĝi same ĝoju pri propra vivo. Sed kiam ĝi libere flugas inter arboj, tiam oni ĝin mortpafas. Kiel teruraj estas la homoj!**

LENJO: Ankaŭ mi dezirus havi tian birdeton, kaj ankaŭ mi ĝin metus en kaĝon kaj donus al neniu.

MAIJA: Ho, kia vi estas!

LENJO: Kia do mi estas? Tia sama kiaj estas ĉiuj. Nur vi estas stranga.

MAIJA (flustre kantas):

Nuboj klaraj,
Silke blankaj,
Surtere frostas,
Al suno grimpas.

Ventetoj, nubetoj,
Trie — sopiroj, —
Kie ci estis
Kvara ĝis nun?

Ekstera flamet'
En kiu loko?
Kiu min ligu?
Aranefadenet'.

LENJO: Kantu, kantu, — sed ĉu via Heil ne estas tia sama? Ĉu vi mem ne estas kvazaŭ birdeto, kaj ĉu li donas vin al iu? Ĉu li ne insultas kaj ne furiozas? Kaj ĉu vi lin fordonus al iu? Frida kaj la aliaj jam delonge kaptemas lin.

MAIJA: Ne parolu, Lenjo! Tiajn aferojn vi ne komprenas. Heil estas plej bona kaj plej honesta en la mondo, plej bela kaj plej aminda — (ne aŭskultante Lenjon):

Fruleviĝis Aŭseklitis[1])
Iris florojn rigardadi, —
Okuletojn ĉiuj kaŝis
Rosoplenaj, revoplenaj.

LENJO: Do, vi opinias ke mi estas tiel eta, ke nenion komprenas! Mi same kiel la grandaj fraŭlinoj, scias, kio estas interkisadi kaj koketi, mi scias ĉion, ĉion. Mi scias, kio estas amo.

MAIJA: Nu, kio do estas amo?

LENJO: Amo estas, kiam oni sidas en sino kaj ricevas donacojn kaj laŭte, laŭte akrekrias kaj ridas.

MAIJA: Ne, tio ne estas amo.

LENJO: Nu, kio do estas amo?

MAIJA: Amo prenas nenian donacon, sed fordonas ĉion, ĉion; ĝi estas silenta, kiel tagmezo, kiam ĉiuj dormas kaj sole nur la suno brilas; ĝi estas profunda kiel ravino de Gaŭja[2]), plena de

---

[1]) Auseklītis — matenstelo.

[2]) Gaŭja — plej granda rivero en Vidzeme (Nordlatvio). Ĝiajn altajn kaj belajn ravinojn (precipe en ĉirkaŭaĵo de Sigulda—Krimulda—Turaida) oni nomas Latva Svisio.

florantaj floroj, verdaj arboj kaj najtingaloj, sed en mezo la bona spirito, la bona koboldo en sia groto.

LENJO: Mi scias, scias, scias, — kiam oni sidas unu ĉiflanke, alia trans la fonteto, — ĉu ĝi estas amo? He, kiam ĉiuj estas kune kaj oni drinkas, dancas kaj gajpetolas, — tiam! Mi ĉion scias.

MAIJA: Sed kion diros via panjo pri tia scio?

LENJO: Ŝi ekscios nenion. Vi ja ne diros al ŝi pri mi, kaj ankaŭ mi pri vi diros nenion.

MAIJA: Pri mi vi povas diri kion vi nur volas, mi havas nenion por kaŝi. Ne mensogu nur.

LENJO: Kial mensogi. Mi ja sen tio scias ĉiujn sekretojn. Mi scias, ke vi estas infano trovita sur batalkampo inter falintoj, levita pro kompato kaj adoptita. Vi havas nek patrinon, nek patron, sed mi havas multajn.

MAIJA: Kie vi ilin havas, la multajn?

LENJO: Mi havas patron kaj onklojn kaj iliajn patrojn. Mi fordonos al vi la miajn, kiam ne sufiĉos al vi la mortintaj kaj nura Greif, kiu ankaŭ estas nur duonpatro. Vi estas bona. Mi amas vin kiel mian panjon; ne, ankoraŭ pli multe — kiel blankan paneton, trempitan en mielo. Ne, ne, ankoraŭ pli multe.

MAIJA: Ho, vi eta babilulino, — vi kara knabineto!

LENJO: Nu, ĉu vi deziras! Ĉu vi deziras mian panjon aŭ paĉjon?

MAIJA: Mi ne deziras ilin, al mi sufiĉas la mortintoj. Mortintoj estas pli bonaj ol vivantoj.

De mortaj mi venas,
Al mortaj mi iras
Tra vivaj mi dancas
Kvazaŭ blov' de zefir'.

Kie estas mia panjo?
Kie estas mia paĉjo?
Kiu manojn nun etendos,
Kiu nun karesos min?

LENJO: Mortintoj ja ne moviĝas.

MAIJA: Polvo ŝutiĝos,
Pluveto gutos,
En la okulojn
De la mortintoj.

Nenion ili evitas,
Timtremas, nek skuiĝas —
Rigardas estontecon
Okulo de l' mortintar'.

Nenion ili deziras,
Nenion ili soifas —
Vaporo supreniĝis,
La animo kun ĝi.

LENJO: Mi certe ne iros kun ili. Terure kaj malĝoje fariĝas, dum vi tiel parolas. Sed vi ja volas min nur timigi, pro mia multa babilado. Vi ja mem ridas. Vi estas tia stranga; vi estas pli stranga ol stranga, tia vi estis neniam. Venu, ni petolu!

MAIJA: Ni petolu! Venu kaj kaptu min!

LENJO: Vi estu birdeto, mi la ĉasisto.

MAIJA: Jen! Ĉiuj deziras esti ĉasistoj.

LENJO: Ĉu ni vin ne kaptos?

MAIJA: Mi ne deziras! Mi ne estas kaptaĵo. Kiel teruraj estas homoj!

DUA SCENO

La samaj. Venas Skudritis

SKUDRITIS (senbrue malfermetas la pordon kaj tra la fendo eniĝas internen. Ridetante li staras kaj observas Maija'n, poste timeme tuŝas ŝin, kiam ŝi preterkuras): Panienka[1]) Maija, panienka Maija, nun mi vin kaptos.

MAIJA (frapita): Ho, Skudritis, kial vi enŝteliĝis ĉi tien? Kial vi timigas nin, kaj venas sen antaŭsciigo?

SKUDRITIS: Panienka Maija, mi nur simple. Mi frapis, sed panienka ne aŭdis; panienka ridas. Panienka Maija estas tiel gaja; se panienka Maija estus panienka moja[2]).

MAIJA: Kion vi deziras diri?

SKUDRITIS: Nu, kiam panienka Maija estus moja, estus mia; panienka ja estas tiel gaja kaj bela.

MAIJA: Tiamaniere mi ne estas prenebla. — Sed vi ja, Skudritis, eldiris ŝercon: panienka Maija — panienka moja. Ŝerci al vi okazas unuan fojon.

SKUDRITIS: Nu, ĉu la unuan fojon? Ĉu estis bona ŝerco? Sed longe mi pensis, ĝis elpensis.

MAIJA: Longe vi pensis kaj tamen elpensis malĝuste.

SKUDRITIS: Sed ĉu panienka ne povus esti moja? (Li etendas la manojn.)

MAIJA: Pli bone ne etendu manojn al mi! Ĉu vi ne scias, ke sufiĉas al mi diri nur unu sorĉvorton kaj viaj manoj rigidiĝos por ĉiam, kiel sekaj branĉoj de arbo?

SKUDRITIS (subite mallevas la manojn kaj kankre-iras kelkajn paŝojn): Panienka Maija ja ne estos tiel kolera!

MAIJA: Nu, kial do vi proksimiĝas al mi?

SKUDRITIS: Mi ŝatas, panienka, mi tiom ŝatas!

MAIJA (rigardas lin).

---

[1]) panienka (elp. panjenka) (pollingve) — fraŭlino.

[2]) moja (pollingve) — mia.

SKUDRITIS (ektiminte, rapiddiras): **Mi venis rigardi, ĉu eblas veni. Pan[1]) standardjunkro ordonis al mi rigardi. Mi nur simple. Mi jam iras, — panienka Maija, przepraszam[2]), panienka Maija, pardonu!** (Foriras.)

TRIA SCENO
Maija kaj Lenjo

LENJO: **Kia stranga estas la duonpoleto! Kiel li ektimis! Sed ĉu vere vi posedas tiajn sorĉvortojn?**

MAIJA: **Kaj kiel vi opinias?**

LENJO (balancas la kapon).

MAIJA: **Mi sorĉas, sorĉas, sorĉas —**
Kion mi en manoj tenas —

LENJO (fermas per mano ŝian buŝon): **Silentu, silentu, diru nenion!**

KVARA SCENO
Venas Jakubovski

JAKUBOVSKI (belvestita en uniformo de standardjunkro, sed sen sabro): **Estimata fraŭlino, ne ĉiuj viroj estas tiel teruraj, kiel vi bonvolis diri. Mi mem, ekzemple, tute ne estas terura. Jen, mi venas eĉ sen sabro, postkiam vi nur rimarkis, ke vi timas de sabro, eĉ kiam ĝi estas eninge.**

MAIJA: **Sed vi ja timigis min, tiel subite enirante, same kiel via amiko, sinjoro Skudritis.**

JAKUBOVSKI: **Kia li estas al mi amiko? Ni havas nenion komunan; li estas mia subulo kaj servisto.**

MAIJA: **Vi havas ja sufiĉe multe komunan: kune vi alfugis el Pollando kaj komunajn vi havas la manierojn. Ambaŭ vi venas sen sciigo kaj vi, sinjoro standardjunkro, eĉ kaŝe aŭskultis malantaŭ la pordo, kion ni parolis. Tian kutimon havas servistoj kaj tiuj, kiuj estas komunaj kun ili.**

JAKUBOVSKI (ekscitiĝante, sed tuj sin bridante): **Estimata fraŭlino, mi petus — —** (Li subite ŝanĝas sian tonon de indigno je ironio kaj koketemo): **Vi mem, estimata fraŭlino, ne unufoje diris, ke vi havas neniajn sekretojn, nur oni ne mensogu. La mensogo ne plaĉas al vi.**

MAIJA: **Fi, tre estimata sinjoro standardjunkro, — do vi la tutan tempon spionis post la pordo. Fi!**

JAKUBOVSKI: **Nu, jen, mi ne mensogas, kvankam ĉi okaze mi ĝin povus fari tiel facile. Kaj kvankam mi ŝatas mensogi, — se nur bele riceviĝas, — precipe al fraŭlinoj. Kaj ĉu multe oni sukcesas per vero — precipe ĉe fraŭlinoj?!**

---

[1]) pan (pollingve) — sinjoro.
[2]) przepraszam (elp. pŝepraŝam) (pollingve) — pardonu.

MAIJA: Bonegan vi havas, sinjoro standardjunkro, militistan konvinkon pri neceso de mensogo.

LENJO (ekridas kaj pretiĝas forkuri tra la pordo): Hi, hi, hi — al fraŭlinoj oni povas mensogi.

MAIJA: Lenjo, ne foriru! restu ĉi tie! — Vi, sinjoro junkro, parolu tiel, ke ankaŭ la infano povus aŭskulti.

JAKUBOVSKI: Jen, vidu, — mi ne mensogas: efektive, mi kaŝe aŭskultis post la pordo vian belan voĉon, vian senzorgan arĝentoklaran ridon, vian anĝelan, senpekan petoladon, kiel petolas flugilhavaj amdietoj. — Nur ne surtere, sed en paradizaj ĝardenoj. — Kie do aliloke mi aŭdu tion, se ne kaŝe malantaŭ la pordo, tra ĉi tiu fendeto rigardante la brilperfekton, kiel knabinetoj tra ŝlosiltruo rigardas en luksan salonon de nobeloj. Vi estas mia paradizo, — mi amas vin!

MAIJA: Sinjoro junkro, ĉu tiel oni parolas kie infanoj aŭskultas?

LENJO (silente): Kion do oni ne povus ĉi tie aŭskulti? mi ne nur tiajn aferojn estas aŭdinta.

MAIJA (per mansvingo riproĉas Lenjon).

JAKUBOVSKI: Mi ne parolis al infano, mi parolis al vi, Maija. Vi rifuzis min, kiam antaŭ tri monatoj mi svatis vin vere, sankte, kun milit-oficira honoro.

MAIJA: Jes, jes, jes — kiel nuna standardjunkro de lia moŝto Sveda reĝo kaj iama standardleŭtenanto de lia moŝto, la reĝo Pola.

JAKUBOVSKI: Vi bonvolas nur moki min, kiam mi parolas pri miaj plej profundaj sentoj.

MAIJA: Mi ne kredas, ke vi eldiras viajn sentojn. Ni ĉiu diverse komprenas la sentojn.

JAKUBOVSKI: Kion oni tie povas kompreni diverse: amo estas amo, tio sufiĉas. (Tiam eksentante sin en rolo de venkinto, duonruze, kokete.) Sed se mi malveron dirus al vi, ke mi edziniĝos kun Frida, Hulda, aŭ Anna, — tiu kun la longaj harligoj, kiuj estas tiel facile kapteblaj, — sed vi ja havas pli belajn harojn ol la aliaj, — aŭ kun Maria, aŭ kun pani[1]) Skolastika, sed ŝi estas jam edziniĝinta, aŭ kun ĉiuj samtempe, — tiam mi ricevus ankaŭ vin, se vi estus ĵaluza. Vidu do, kiel sincera mi estas! Kaj kvankam vi kiel birdeto flugas de mi, mi tamen ne mortpafas vin.

MAIJA (ektremas kaj retiriĝas): Mi timas de vi. — Mi rifuzis vin antaŭ tri monatoj, ĉar mi jam pli frue fianĉiniĝis kun alia.

JAKUBOVSKI: Nu jes, jes, mi scias: kun la ĝardenisto Heil, kvankam ĉi tie estas standardjunkro. — Kaj, jen, panna[2]) Maija,

---

[1]) pani (pollingve) — sinjorino.
[2]) panna (pollingve) — fraŭlino.

ĉi tiu folivermulo certe estus vin ĉirkaŭmanĝinta. Pafinta li efektive ne estus, ĉar li havas nenion, per kio pafi. Sed li liberon al vi ne donos kaj ne liberigos vin propravole, ĉar li ne havas aliajn virinojn. De li ja forkuras ĉiuj knabinoj, kvankam al vi li ŝajnas nekompareble bela. Ĉar li povas neniun fraŭlinon ricevi, li devas ŝajnigi sanktulon. Li ja ankaŭ ne scius kion fari kun knabinoj, li ja ne estas fortulo. Per sia ĝardenhakilo li povas ĉirkaŭhaki nur la branĉetojn de arboj; tion povas ankaŭ ĉiu kaprineto. Vi lin kompatis, do li sin tenas je vi. Al via jupo li alkroĉiĝis kiel timema vilaĝa knabo kaj nenien foriĝas.

MAIJA: Jes, li estas fidela, li estas viro, kiun oni povas fidi.

JAKUBOVSKI: Fidi lin?! Ha, ha, li mem tuj ekfidus, se nur estus iu (virino), kiu lin ekrigardus. Necesos dungi iun fraŭlinon, kiu ekflirtu kun li. Tiam vi vidus.

LENJO (mallaŭte): Tiam vere estus bele! Ankaŭ mi tion volonte dezirus vidi.

JAKUBOVSKI: Saĝa infano! (Li ekridas.) Li algluiĝis al vi, kiel abelviro al mielo kaj allasas neniun. Vi devus esti ankaŭ pli memstara. Estu libera konkuro, mi tiam tuj forprenos vin de li.

MAIJA: Vi parolas kaj pensas pri Heil nur malbonon, sed li pri vi — bonon; li ne scias, ke vi estas tia malbonulo.

JAKUBOVSKI: Kion li povas paroli pri mi malbonan? Mi estas belstatura militisto, altranga homo kaj scipovas konkeri fortikaĵojn, estu ili armitaj per kanonoj aŭ per akra langeto. Sed kion mi bonan diru pri li? Simpla homo de malalta rango; bona metiisto — maksimume.

MAIJA: Li ne estas simpla, li estas korbona.

JAKUBOVSKI: Servisto devas esti korbona kontraŭ siaj mastroj. De nobeloj kaj militistoj oni postulas ion alian: forton kaj kuraĝon. (Tromemfide.) Nu, ĉu via fortikaĵo ne kapitulacus, se mi ĝin prenus perforte?! Forto plaĉas al virinoj. (Li subite ĉirkaŭbrakas ŝin.)

MAIJA (rapide): Iru for! (Forpuŝas lin.)

LENJO (ekridas kaj aplaŭdas): Hi, hi, hi!

JAKUBOVSKI (liberigas Maija'n, al Lenjo): Kion vi ĉi tie faras? Iru, panjo vokas vin!

LENJO (kaŝiĝonta): Tute ne vokas!

MAIJA: Restu ĉi tie, Lenjo! Mi timas.

JAKUBOVSKI: Estimata fraŭlino, ne timu. Mi faros al vi nenian malbonon. Honoran vorton. Mi volas nur diri al vi ion tre gravan, kion la infano ne devas aŭdi. Mi vidas: per forto, per simplaj helpiloj, per simpla amindumo ĉe vi oni sukcesas neniom. Vi estas tre stranga knabino, vi estas kreaĵo de pli alta speco. Vi senarmigas min. Mi kapitulacas. Mi petas pardonon. Vi venkis min. Neniu virino tion sukcesis. Honoran vorton!

La infano iru! Vi ne timu! Mi volas ion diri al vi, de kio dependas mia vivo. Mi ĵuras je honora vorto. Kredu min kiel homon.

MAIJA: Lenjo, vi povas iri.

LENJO: Mi ja scias. Hi, hi, hi! (Foriras.)

KVINA SCENO

La samaj sen Lenjo

JAKUBOVSKI: Jen! nun ŝi estas for. Nun ni estas liberaj! (Proksimiĝas al Maija.)

MAIJA (retiriĝas): Parolu! Kion vi havas por diri, de kio dependas via vivo?

JAKUBOVSKI: Ne forkuru! Heil ja neniam venas dum tagmezo, — ne estas kaŭzo por timi. Kaj tiom da libereco li ja povas permesi al vi: interparoli kun konato — pli altranga homo, ol li mem.

MAIJA: Jes, jes, sinjoro standardjunkro, tion vi kelkfoje memorigis al mi, — via rango vere same alte leviĝas super la aliaj, kiel la bastono de standardo super la regimento.

JAKUBOVSKI: Maija, ne moku min en ĉi tiu momento! Mi amas vin, freneze amas! Feliĉe mi elektis la momenton por diri tion al vi — vi evitas min. Mi persekutas vin jam tutan jaron — — —

MAIJA: Same kiel ĉiujn aliajn knabinojn.

JAKUBOVSKI: Por vin inciti! Kaj por kiu do ili estas, se ne por militisto, kiu kapablas ilin preni? Sed vi estas io tute alia — vin mi ekamis kiel malsaĝa lerneja knabo, kia mi estis ĉe mia patro — instruisto.

MAIJA: Se via patro estis instruisto, ĉu li instruis vin persekuti knabinojn kaj diboĉi?

JAKUBOVSKI: Ne, tion instruis al mi la tempo, — nia milittempo. Sed mi krom tio scipovas legi kaj skribi; mi renkontiĝas kun oficiroj kaj pli superaj homoj, — Heil tion ne povas, — li estas de malalta rango. Mi havas monon kaj valoraĵojn, Heil estas malriĉegulo. Mi estas pola nobelo, vi ja komprenas.

MAIJA: Mi komprenas, komprenas: se vi estas tiel alte levita jam de la naskiĝo, kial do vi devas turmenti vin per legado kaj skribado? Heil kontraŭe devas kleriĝi, ke li io estu. Li ne posedas dum milito akiritajn monon kaj valoraĵojn, tiom pli li devas posedi bonajn virtojn.

JAKUBOVSKI (ridas): Ha, ha, ha — pri liaj bonaj virtoj vi parolos alie, kiam li batos vin pro ĵaluzo aŭ volos vin mortigi. Sed min vi sorĉis per via beleco kaj afabla naturo.

MAIJA: Nenian specialan afablecon mi montris al vi.

JAKUBOVSKI: Bedaŭrinde ne, sed kial mi estas kvazaŭ sorĉita de vi?

MAIJA (ridas).

JAKUBOVSKI: Eble vi efektive posedas iajn sorĉvortojn. Sed vi igis min alia homo, vi ĉarma — (li proksimiĝas al ŝi. Maija retiriĝas). Jen, — pli frue mi — eĉ ne unu momenton estus hezitinta kapti vin — belulineto — mi havas flamiĝan naturon, ĉion mi disrompas, ĉion, kion mi deziras, mi atingas — sed nun, jen, mi rezignas. Ne timu! — vi igis min alia homo: vi riproĉis min, ke mi diboĉas, kaj mi plu ne drinkas kaj ne petolas kun knabinoj — vi levas min al la ĉielo, kio estas via devenejo! Sed mi venas el infero.

MAIJA: Mia devenejo estas la batalkampo kun mortintoj, — tion diras al mi eĉ infanoj.

JAKUBOVSKI: Do, ni ambaŭ estas infanoj de militkampo! ni taŭgas kune. Per miaj fortaj manoj mi levos vin de batalkampo kaj de la mortintoj al ĉielo, kie vi estos anĝelo inter aliaj anĝeloj! Kaj al mi vi etendos la fingreton, ke ankaŭ mi kungrimpu ĉielen al viaj piedoj! (Li subite ĉirkaŭbrakas ŝin, altenlevas kaj kisas.) Hopa! hopa!

MAIJA: Lasu min! lasu! tuj!

JAKUBOVSKI (lasas ŝin, ridante): Hura! La unua breĉo en muro de la fortikaĵo! hura!

SESA SCENO

La samaj. Venas Viktoro Heil

HEIL (krias): For, vi malnoblulo! Lasu ŝin! For de ĉi tie.

MAIJA (liberiĝante de Jakubovski): Ho, mia Dio!

JAKUBOVSKI (al Heil): Kion vi kuraĝas? ĉi tie krii! Kial vi venas ĉi tien sen sciigo?

HEIL: Ankoraŭ li diros al mi, ke mi venas sen lia permeso! For de ĉi tie! Tuj!

JAKUBOVSKI: Ne estas ĉi tie via loĝejo. Ĉi tie la fraŭlino disponas.

MAIJA: Iru! iru pro Dio!

HEIL: For! aŭ mi — — —

JAKUBOVSKI: Mi vin ne timas, psiakrew![1]) Pri elĵeto vi povas minaci al napo aŭ rapo, sed ne al militisto. Mi konatigos vin kun mia sabro! (Kaptas sabron, sed ne trovas ĝin.)

HEIL: Ni vidu, ĉu vi ne estos la putrinta rapo!

JAKUBOVSKI: Maija, kien vi metis mian sabron? — Ho, mi malsaĝulo, mi venis sen ĝi!

---

[1]) psiakrew (pollingva insulto): „hunda sango".

MAIJA: Ne malpacu, pro Dio! Bone ke vi ne kunhavas la sabron!

JAKUBOVSKI: Maija! Li ne malpacu! Li ne pelu min! Mi estas oficiro; li ne rajtas. Estas via ĉambro.

HEIL: Mi rajtas: mi estas fianĉo de la fraŭlino!

JAKUBOVSKI: Ni vidos, kia ĉi tiu servisto estas fianĉo, hamo, hunda sango! Fianĉiĝu kiom vi deziras — mi la unua prenos vian fianĉinon, ci verda brasika vermo. — Estu salutata, Maija,— panna Maija, panna moja!

(Li etendas al Maija la manon kaj tiras ŝin al si.)

HEIL (forpuŝas la manon de Jakubovski kaj eltiras de la zono sian ĝardenan hakilon): For, sentaŭgulo!

MAIJA (haltigas Heil je la mano).

JAKUBOVSKI: Atendu! Min rememoros vi kun tuta via hakilo, malpurulo! Ĉu vi estas por mi rivalo? Adiaŭ Maija!

(Li iras, revenas, kolere ekkrias kaj foriras.)

SEPA SCENO

La samaj sen Jakubovski

MAIJA (tenas ankoraŭ Heil je la mano): Viktoro, Viktoro, Viktoro, ne batu lin per hakilo! Ĵetu ĝin for! Estu prudenta! Trankviliĝu!

HEIL: Mi estas prudenta. Sed ĉu vi estas prudenta? (Li liberiĝas de ŝiaj manoj.)

MAIJA: Trankviliĝu, trankviliĝu! Karulo, bonulo, karulo!

HEIL: Iru for! Ĵus vi ĉirkaŭbrakis la sentaŭgulon. Ĉu vi same deziras ankaŭ min ĉirkaŭbraki?

MAIJA: Ve! Ve! Ve! (Ŝi forkuras en alian flankon de la ĉambro.)

HEIL: Ne forkuru! Mi estas trankvila. Klarigu al mi, kion signifas ĉio, kion mi vidis?

MAIJA: Ho, Jakubovski, Jakubovski — alvenis. — Ni estis ĉi tie ambaŭ kun Lenjo. — Tiam Lenjo — —

HEIL: — Tiam Lenjo elkuris kaj avertis min, ke mi ne venu ĉi tien, ke vi ne povas kun mi paroli.

MAIJA: Kion? Lenjo? Ŝi vin avertis? Mi nenion scias!

HEIL: Ha, vi nenion scias! Kaj kion signifas ke la sentaŭgulo vin ĉirkaubrakis kaj kisis kaj kriis hura! Ĉio dum la tempo, kiam mi ne rajtis enveni.

MAIJA: Ho, ne tiel, ne tiel! La infano simple miskomprenis? Jakubovski deziris fari al mi nenian malbonon. Li promesis nun esti bona kaj obeema.

HEIL (arte subpremante la eksciton): Ha! bona kaj obeema! — Nun vi deziras lin havi?! Vi rifuziĝas de mi? Diru al mi klare kaj kompreneble! — Mi riproĉos al vi nenion! Tiam mia vivo decidiĝos.

MAIJA (alproksimiĝas al li, petante): Ho, ne, ne, ne!

HEIL (kun kolero, kio iĝas sarkasmo): Ne? Ĉu vi deziras havi nin ambaŭ? Aŭ ankoraŭ pluajn, kiel oni ĉi tie kutimas?

MAIJA (evitas lin kaj silente flankeniĝas).

HEIL (pli ekscitiĝinte, kaptas ŝin je mano): Parolu vi, parolu!

MAIJA (ekkriante): Ve! Ve! Vi premas mian manon!

HEIL: Parolu! Nu! — Ĉu vian buŝon malfermi per rompfero, kiel ŝvelintan pordon?

MAIJA: Ĉu vi ankaŭ min deziras haki per via hakilo? — Ve! Ve! — Metu for la hakilon! ne venu al mi kun la hakilo! Jen, ankaŭ li formetis sian sabron, kiam —

HEIL: Diru, diru, kial vi abruptis? — Kiam li venis al vi, kien do li metis sian sabron? Mi ne vidas.

MAIJA: Li venis sen la sabro.

HEIL: Ha jen! Vi pri tio havis jam antaŭan interkonsenton, — vi havas diversajn antaŭajn interaranĝojn — vi! vi! (Li denove kaptas ŝian manon.)

OKA SCENO

La samaj. Venas Frida

FRIDA: Ho, vi, Viktoro, estas ĉi tie?!

HEIL: Kion vi volas? Kial vi venis?

FRIDA: Nu, — mi ja pensis ke ĉi tie la polo kun Maija interparolas, sed nun mi vidas ke vi malaranĝis iliajn kutimajn aĵablajn interparolojn kai minacas al Maija per hakilo.

HEIL (konfuziĝas, formetas la hakilon): Kia sensencaĵo! Ĉu mi per hakilo minacas al Maija? — Vi iru for! ne montru ĉi tie viajn okulojn!

FRIDA: Jen! kiel severe! Kial vi nun forpelas min? Vi mem ja de mi eksciis, ke la polo venas ĉi tien kaj nur tial vi venis ne ĝustatempe!

MAIJA (al Frida, ruĝiĝante): Hontu vi!

FRIDA: Mi hontu?! Li ja perforte tion elmarĉandis de mi. Ĉu vi mem eble ne pli hontu, ke vi interrilatas kun diversaj uloj kaj forlasas vian bravan fianĉon?

MAIJA: Mi faris nenian malbonon, antaŭ kiu mi devus honti. Mi kun neniu havas amaventurojn, kiel vi.

FRIDA: Kiu do estas la fianĉo? Ĉu la oficira moŝto? Vi ja havas multajn adorantojn. Vi estas lerta.

HEIL: Kia li estas oficira-moŝto? Pola vagisto! Transkurinto! Perfidulo!

MAIJA (al Frida, simple, konfuziĝinte): Mi amas Viktoron!

FRIDA: Jes, jes, ankaŭ Viktoron. Kiu do ne amas Viktoron? Ĉiuj fraŭlinoj sekrete okulpafas lin, ne sole vi. Serioza li estas kaj delikata, tute alia ol ceteraj viroj. Vi nur ekscitas lin. Li estas — trankviliginda kaj kompatinda.

HEIL (al Frida): Do, — ĉiuj fraŭlinoj okulumas min, sed ĉiuj sin ĵetas en brakojn de la polo. Kaj vi la unua.

FRIDA: Vi ja estas kvazaŭ dorna, sindetena kaj virta. Vin ĉiuj knabinoj timas; vin oni nur ŝatas, sed kun la polo oni ŝercas.

HEIL: Ŝercas, ŝercas, ĝis kiam serioziĝas.

FRIDA: Ne estas ja la mondo tiel sankta, kiel vi. — Ĉu ne, Maija? (Maija sin forturnas). Estas ja milita tempo, hodiaŭ — viva, morgaŭ plu ne. — Sed se oni geedziĝas, oni ne ŝercas...

HEIL: Se oni ekkutimis ŝerci, oni ŝercas ĉiam.

FRIDA: Mi ne estas tia. Kiu geedziĝos kun mi, tiu spertos. Mi ne estas, kiel aliaj, kiujn oni per hakilo devas puni. Al vi ne sufiĉas, kion vi mem vidis. Vi atendos ĝis kiam la fianĉino alportos al vi malgrandan kapeton kun nigraj bukloj.

HEIL: For!

FRIDA: Baldaŭ vi petos, ke mi venu helpi vin. Sen mi vi ja ne liberiĝos de ŝi. — Bonan apetiton, se vi varmigos la tagmanĝon! (Ŝi foriras kun riverenco kaj ridante.)

NAŬA SCENO

La samaj sen Frida

HEIL: Bestoj! bestoj! bestoj! Ĉiuj fraŭlinoj estas bestoj! Kvazaŭ fiinsektoj eksidas sur rozfolioj kaj formordas ilin. He! Rampas kvazaŭ glitigaj limakoj, postlasante mukon sur la floro, tiel ke naŭzas ĝin poste en la manon preni. Oni donas al ili la koron, sed ĉu ili la koron bezonas? Ili bezonas ion tute alian. Ĉiuj estas egalaj! Ĉiuj kvazaŭ lumbrikoj el la sama rubo. Naŭzas, naŭzas, naŭzas! La koro laciĝas de abomeno. (Li eksidas sur seĝon kaj ektenas la kapon per la manoj.)

MAIJA (venas al li kaj metas la manon sur lian ŝultron, — li forskuas la manon): Heil! Heil! Ĉesu, ĉesu! Ne ĉiuj virinoj estas tiel abomenaj kaj malĉastaj, kiel ŝajnas al vi dum kolero. Ankaŭ Frida ne estas tiel malbona.

HEIL (manojn ne deprenante de la kapo; maldolĉe ridante eligas tra dentoj): Ho, ho! — ne estas, ne estas Frida tiel malbona! Kial do ŝi ankoraŭ ĵus agitis kontraŭ vi. Jes, ŝi ne estas, ne estas tiel malbona!

MAIJA: Jes, almenaŭ unu bonon ŝi nun faris, ke neatendite ŝi venis kaj forigis la erupcion de via kolero.

HEIL (maltrankvile): Ho, lasu min!

MAIJA (jen per rezonado, jen per humoro, jen per multvorteco penas forigi lian koleron): Ho, Viktoro, kara Viktoro, ne koleru, jen, ankaŭ via propra koro nun doloras! Ne estas la homoj tiel malbonaj; ĉesos la milito, la vivo denove estos agrabla. Jen, la printempa inundo preterfluis, kiu la tutan Gaŭĵon kunmiksis, — ĉu via vivo ne fariĝos same bela kaj dolĉa, kiel la ravinoj kaj valoj de Turaida? Kaj de nia alta turo vi povos rigardadi profunden trans la malproksimajn bluajn sunpasejojn.

HEIL (same): Ha, ha! kiu sin tie paŝtos? — Ĉu diablaj kaprinoj? (Formetas la hakilon.)

MAIJA: Viktoro, hodiaŭ la homo vivas, sed morgaŭ jam plu ne. Papilio vivas unu tagon, kaj ĝi rapidas flugi kaj mielon suĉi. Kaj ĉu vi pro unu virino malestimas ĉiujn virinojn? Ĉu ankaŭ virino ne estas homo? Kial vi nur ŝin kondamnas? — Kaj ĉu ŝi ŝatas diboĉon? Ŝi deziras, ke oni ŝin rekonu homo kaj estimu. Ŝi ne deziras, ke oni ŝin konsideru kiel propraĵon. Ŝi ne estas ĉashundo, kiun oni fajfvenigas kaj batas.

HEIL (same): Por kiu vi ĉi tion parolas? Ĉu por Frida? Kial vi ŝin tiel defendas? Ĉu vi ne devas defendi iun alian?

MAIJA: Mi opinias, ke vi amas Frida kaj tial vi koleriĝas pro ŝi. — Sed mi ne parolas sole pri Frida, mi parolas pri ĉiuj knabinoj.

HEIL: Nu jes, estus jam tempo ke vi komencu defendi iun alian, — vin mem.

MAIJA: Jes, kara Viktoro, ni parolu pri ni mem: mi trikas por la doto belajn objektojn, — vi havos bele broditan zonon. Venu, mi montros ĝin al vi. (Ŝi tuŝas lin, li denove forskuas ŝian manon.)

HEIL (deprenas la manojn de la kapo; palpas sian hakilon ĉe la zono): Ha, ha, — ĉu vi denove ekpensis pri la edziniĝo? Kun kiu vi nun edziniĝos? Kiam vi aranĝos la geedziĝan feston? Ĉu dum Miĥaela[1]) tago, kiel ni iam priparolis?

MAIJA: Ve! kia vi estas terura! Kiel vi parolas? — Formetu almenaŭ la hakilon! Kial vi ĝin turnadas en la manoj. Mi abomenas la sangoverŝajn ilojn.

HEIL: Nu, nu, — mi ja vin ne hakos. (Formetas la hakilon.)

MAIJA: Estas bone! Kaj nun ne estu tiel severa! Mi vin amas, vi tion scias. Mi amis ankoraŭ neniun. Mi eĉ ne sciis, kio estas amo. Vi mem diris, ke vi kredas je mia amo, — sed kion vi nun parolas?

HEIL (mallaŭte ekĝemas).

---

[1]) 29. septembro. La tradukinto.

MAIJA: Ni aranĝu la geedziĝan feston je Miĥaela tago, kaj festenu tri tagojn, tri noktojn, ke dancu ĉiuj edzinparencoj!

HEIL (denove mallaŭte ekridas).

MAIJA: Sed kia estos nia kunvivo geedza, se jam nun vivi neeblas pro via ĵaluzo? Se mi ne scius, ke vi amas min, kaj ke vi bezonas min, — via ĵaluzo mortigus mian amon. Nia (t. e. virina — rim. de la tradukinto) naturo estas ami kaj esti amata, sed ni tial ne malamas aliajn. Kaj jen, mi vin malgraŭ ĉio tamen amas, mi amas vin, mia kara, bona! Vi ja ankaŭ estas bonulo, nur iafoje vi malsereniĝas. Mi amas vin. (Ŝi metas la manon sur lian kapon.)

HEIL (ne forskuas nun ŝian manon): Tion diras ĉiu virino.

MAIJA (vidante ke li trankviliĝas, parolas pli verve, sed ankaŭ pli malgaje): Neniu vin tiel amos, kiel mi. Neniu povas vin tiel ami, kiel mi. Ne de ĉi-tiu mondo mi venas. Eble vi iam vidos, kiel senlime mi vin amas! Kiam mi pensas pri tio, pezega fariĝas mia koro. Mi dezirus denove ne esti, same kiel mi ne estis antaŭe. Mi timas, mi timas ke ne estu nur malfrue, kiam vi tion ekvidos?

HEIL (ekridas mallaŭte): Ĉu ion similan ne diris ankaŭ Frida, ĵus forirante?

MAIJA (ekscitiĝinte): Ho, ho! Mi ne estas Frida! Vi min ne komprenas. Vi forpelas min kaj mem ne scias kial. (Ŝi forturnas sin de li.)

HEIL (subite ekflamiĝinte, ekstaras kaj alproksimiĝas al Maija): Do, ni geedziĝu, — tuj morgaŭ! — Tiam mi fidos al vi. Tiam mi kredos ĉion. Tiam mi demandos nenion. (Prenas ŝin je la mano.)

MAIJA: Ho, vi parolas neeblon: morgaŭ?! Tio neeblas! Vi ja mem komprenas.

HEIL (denove kun indigno): Nu jen: ne povas! Vi neniam povas. Ĉiam vi prokrastas la geedziĝon; kian kaŭzon vi havas? Kion vi pensas? Kion mi pensu? Mi ĉiam demandas vin pri tio.

MAIJA (malvolonte): Mi prokrastas ĝin pro tio, ke mia doto ne estas preta.

HEIL: Mi ne bezonas vian doton, — mi bezonas vin.

MAIJA: Ankaŭ mi vin ĉiam demandas: ĉu post la geedziĝo vi estos pli trankvila?

HEIL: Tio dependas de vi.

MAIJA: Nu jen! — Neniam vi estos kontenta. Vi turmentos min ĝis la morto. Mi jam nun estas malforta. De tia ekscito, kia denove estis hodiaŭ, mi laciĝas por kelkaj tagoj.

HEIL: Kiel hodiaŭ! Ho! — Nu jes, hodiaŭ, kio okazis? Ne, ne, — mi ne demandos; vi ne deziras, ke mi demandu. (Lia

vizaĝesprimo iĝas insida.) **Sed diru almenaŭ, ĉu vere pro la doto vi prokrastas la geedziĝon? Diru al mi tion elkore.**

MAIJA (konfuziĝante, duonridante): **Mi ne povas diri, — mi hontas.**

HEIL (denove malvarmete kaj kolere): **Do! Vi hontas!**

MAIJA (ektimiĝante): **Denove vi ekkoleriĝas. Ho, kia despoto vi estas! Vi malpermesas al mi eĉ la plej malgrandan liberecon, la plej malgrandan memstarecon, la plej malgrandan virinan sekreton!**

HEIL (subite refalante en sian eksciton kaj pli en ĝin eniĝante): **Mi aŭdas, aŭdas — liberecon vi bezonas. Ĉiam vi memorigas vian liberecon. Sed edzino bezonas nenian liberecon, ŝia libereco estas ĉe la edzo kaj ĉe lia brusto. Sed se vi tiel ŝatas vian liberecon: foriru de mi, tiam iru tuj al via polo! Li permesas liberecon al si mem kaj permesos ĝin ankaŭ al vi!**

MAIJA (forkurante de li, en timo): **Ve! ve! ve! Denove ĉio ripetiĝas! Kaj mi pensis, ke vi jam trankviliĝis kaj denove bonrilatas al mi.**

HEIL: **Bona mi estas kontraŭ vi, sed kia vi estas? Kio do ĵus okazis kun la polo?** (Arte trankviliĝante.) **Vi vidu, mi estas bona, mi ne demandis pri tio, perforte mi subpremis mian ĉagrenon. Sed inter ni klariĝis nenio. Vi respondas nenion. Vi havas diversajn sekretojn.**

MAIJA (kovrante la okulojn per la manoj): **Ve! Denove, denove, denove! — Ho, kiom terura vi estas!**

HEIL: **Terura, terura! — Kaj tio ne estis terura, kion mi vidis? Fremda viro, konata sentaŭgulo, forkurinta soldato — kaptinta mian fianĉinon, mian jam delonge konsentintan fianĉinon, levinta ŝin en la sinon kaj kisas! — Kaj kisas tiun, kiun mi, plenrajta fianĉo ĝis nun neniam kuraĝis kisi! — Ĉu tio ne estis mia estimo kontraŭ vi? Kontraŭ virino kiel tia? Ĉu la estimo ne estas ankaŭ la libereco? Kian vi alian liberecon bezonas? Ĉu ne la saman liberecon vi opinias dirante, ke virino devas esti estimata de la viro? Kian estimon vi ankoraŭ bezonas? — Respondu!**

(Li estas kaptinta Maija'n je la mano.)

MAIJA: **Ve! kiel vi premegas mian manon!**

HEIL: **Mi ne liberigos vin! Respondu! Respondu nun por ĉiuj fojoj. Ne evitemu!**

MAIJA (tiras la manon el lia mano): **Lasu min! Lasu! ne premegu!**

HEIL: **Ĉu al vi pli plaĉis, kiam li vin premis?**

MAIJA: **Bone! Mi diros al vi ĉion, kiel estis, kvankam mi hontas rakonti.**

HEIL: **Mi komprenas, komprenas!**

MAIJA: Nenion vi komprenas. — Aŭskultu! Li estas militisto, dum la milito lia flamema naturo krudiĝis. Sed li estas kapabla boniĝi. Li promesis ne drinki, ne kartludi kaj ne vagadi. Li havas neniun homon, kiu kredus lin kaj kiu lin levus. Ĉiuj knabinoj amindumas lin, nur mi ne. Li esperas, ke mi povus lin savi. Lia vivo dependas de mi. Tiel li diris.

HEIL (maldolĉe ridas): — De via kiso! — Se li vin ne povas preni, tiam li ne povas vivi! Ha, ha, ha! — Kiam li vin ne povas en la sinon sidigi, tiam li ne povas vivi!

MAIJA: Ne tiel! ne tiel! Okazis nenia prenado en sinon. Li nur diris — mi hontas tion rerakonti.

HEIL: Rerakonti hontas, fari ne hontas.

MAIJA: Ni faris nenion hontindan.

HEIL: Ho jen! vi jam kune!

MAIJA: — Li nur diris: mi estas kvazaŭ anĝelo en la ĉielo — kaj miajn piedojn kisi — kaj mi lin kune ĉielen levos — li teniĝos ĉe la plej malsupra borderaĵo de mia vesto — ke mi savu lin.

HEIL: Kaj vi estas preta savi ĉiun! pro kisado de viaj piedoj! Pro kisado de via buŝo! Mi ne vidis, ke li estus kisinta viajn piedojn.

MAIJA: Ne kisis, ne kisis! — nek piedojn, nek ankoraŭ la buŝon! — Preterglitis ĉio! — Li nur diris tiel.

HEIL: Lin vi estas preta savi, kiu pri via savado nur ridas. Al li la savado estas nur simpla babilado por ventkapa malsaĝa virino! Li bezonas ion alian, ol savon, li bezonas vin. — Kaj mi? kaj mi? kaj mi?

MAIJA (alkurante al li kaj lin ĉirkaŭbrakante): Mia kara, mia kara! — Vi ankoraŭ pli ol li! — Vi, vi!

HEIL (krude ŝin forpuŝas): Ne nomu min kun li per la sama buŝo! Mi ne estas tia, kia estas li! Mi estas honesta kaj brava homo!

MAIJA (en ekscito, ne liberigante lin, tenas lin ĉirkaŭbrakatan kaj alpremiĝas al li tiom pli forte): Kara, kara, kara!

HEIL: Ne premu vin al mi! Ĉu vi opinias min same venki, kiel li vin — per forta ĉirkaŭbrako, prenado en la sinon kaj levado aeren! (Li penas liberiĝi de ŝi.) Vi ne liberigas min same, kiel li vin! Eble vi deziras min same kisi, kiel li vin! Fi! — Iru! (Li forpuŝas ŝin.)

MAIJA: Kara, kara! — Ĉio jam preteriĝis! — Kara!

HEIL: Kion vi mensogas! — Vi naŭzaĵo! Vi indas esti ne ĉielen levata, sed inferen ĵetata! — De ĉi tiu alta turo, tien en la nigran ravinon! Tien en la profundajn akvoturnojn de Gaŭja! Tie estas via loko!

MAIJA (forkuras, vokas): **Ve! Savu!**

HEIL: **Kiu vin savu? Kiun vi vokas? Ĉu lin? ĉu lin? Veturu vi al li! Li jam atendas vin!** (Li rapide kaptas Maija'n kaj portas ŝin al fenestro.)

MAIJA (ne kontraŭas): **Prenu min kaj ĵetu malsupren, en la profundegaĵon! Mi ne forkuras de vi, mi tuta estas via. — Ĉu hodiaŭ aŭ morgaŭ! — Mi tion jam antaŭvidis.**

HEIL (alportinta ŝin al la fenestro kaj eliginta ŝin eksteren, ekhaltas kaj inverspaŝas kune kun ŝi de la fenestro; ekĝemas): **Ho!**

MAIJA (ridetas al li, serĉas lian rigardon): **Mia kara! mia kara! Rigardu min! Rigardu min lastafoje! — volonte mi mortas!**



Ruinoj de kastela turo en Turaida, kie havas lokon la unua akto
La kastelo estas konstruita en 1213

HEIL (subite metas ŝin sur plankon): **Per la sama diineca rideto vi ridetis ankaŭ al li! Per la samaj lipoj vi kisis lin!**

MAIJA: **Ne, ne, ne! Mi kisis ankoraŭ neniun!**

HEIL: **Vi mensogas! vi mensogas! Mensogas! Malsupren estas via vojo! Tamen!** (Li kaptas ŝin denove kaj rapide alkuras al la fenestro.)

MAIJA: **Estas bone! — Lasu min ŝvebi! — Same mi iam kiel animo malsuprenŝvebis de ĉielo teren. Tiam min malsuprenigis malgrandaj anĝeletoj, nun min malsuprenlasas mia karulo.**

HEIL: **Malsupren! malsupren estas via vojo! Se vi parolos eĉ per anĝelaj langoj!**

MAIJA: **Mia kara! — Ĉi tiujn lipojn mi rezervis por vi, tiel freŝajn, purajn kaj virgajn, kiel floreton de rozo kun ĉiuj klaraj**

netuŝitaj gutetoj de la roso. Mi malsupreniĝos en la profundaĵon kaj mallumon kaj ne sentos la varmon kaj dolĉon de via spiro,— de malvarmo kaj nokto mi devenas kaj en la malvarmon kaj nokton mi reiras, — mi vidis vin kiel sunradieton, kvankam min ne varmigis mia suneto — ho! — Sed vi, mia kara, ne devas resti sen varmo, vi ricevu — almenaŭ la imagon pri la varmo, almenaŭ rememoron pri la dolĉo! Ke vi povu la vivon pli facile elporti! Ke vi havu rememoraĵon de mi, kiam vi min plu ne havos!

HEIL (denove agitiĝas): Ve! ve!

MAIJA: Ne ĝemu, mia kara! Ke vi neniam ĝemu sen mi!

HEIL (ektremas, inversiras unu paŝon kaj iras denove al la fenestro.)

MAIJA: Jen, kara! Prenu la unuan kaj la lastan mian kison! Suĉu de miaj lipoj la antaŭsenton de la varmo! rememoron pri la dolĉo! Estu salutata! mia kara! mia karulo!

HEIL (rapide forturnas sin de la fenestro, ŝanceliĝante rapidas al seĝo kaj eksidas): Maija! Maija! mia! mia! Ni vivu! (Li kisas ŝin.)

MAIJA (desaltas de lia sino): Ho! — Estus bone tiel — ĉio finita! (Ŝi kovras la vizaĝon per la manoj kaj ekploras.)

HEIL (subite gaja): Ni vivu, ni vivu! Vi estas mia! Vi min savis! Mi vin bezonas!

MAIJA (malgaje): Jes, vi min bezonas! Ni vivu! Ni vivu! — Ho!

HEIL: Mi iĝos tute alia homo!

MAIJA (rememorante, ektimas): Tute alia homo!

HEIL (ankaŭ ektimas, timeme): Kio estas kun vi, mia kara!? Mia anĝelo! Mia gardanĝeleto!

MAIJA: Nenio, nenio! — Ni komencu denove vivi!

HEIL (denove gaje ekflamas): Ni vivu! Ni vivu! Vi — mia feliĉo! Vi — mia suno!

MAIJA (prenas lin je la mano): Ni vivu!!!

Kurteno

A K T O D U A

UNUA BILDO

Drinkejo ĉe la kastela korto, sur roka pendaĵo

UNUA SCENO

Jakubovski kaj Grenjo

JAKUBOVSKI (venas kaj eksidas ĉe tableto, ne salutante drinkejan servistinon, kiu afable renkontas lin): **Vinon!**

GRENJO: Saluton! Saluton! sinjoro junkro! (Etendas al li la manon, kiun li ne akceptas). **Ĉu vi ne deziras, ke mi donu al vi la manon? Nu, do prenu! Mi donos al vi la buŝon.**

JAKUBOVSKI (forturniĝas): **Vinon!**

GRENJO (alportas vinon, enverŝas ĝin kaj drinkas mem): **Nu, estu do iom pli afabla, sinjoro junkro! — Ĉu vi hieraŭan tagon jam forgesis?**

JAKUBOVSKI: Kion vi parolas? Kion vi deziras?

GRENJO: Hieraŭ vi parolis alie. Hieraŭ vi estis volulo. Kio al vi okazis hodiaŭ?

JAKUBOVSKI: Okazis nenio, pri kio vi devus interesiĝi.

GRENJO: Tiel! Sed ĉu tio, kio okazis hieraŭ, okazis sen mia partopreno?

JAKUBOVSKI (maltrankvile ekmoviĝas kaj drinkas iomete.)

GRENJO: Ĉu, eble, vi malgajnis la tutan monon je ĵetkubetoj? — Drinku je ŝuldo! — Nu drinku eĉ sen la ŝuldo! — Mi alportos al vi vinon senpage! — Mi alportos al vi min mem! (Ŝi eksidas en lia sino.)

JAKUBOVSKI (forpuŝas ŝin): **Kie estas Skudritis? Voku lin!**

GRENJO: Vi, certe, nun havas alian knabinon. — Mi deziras kun vi interparoli nemalhelpite. Venu hodiaŭ, tagmeze, kiam ĉiuj dormos, — vi scias, samloke —

JAKUBOVSKI (forskuiĝas de ŝi; malpacience): **Voku Skudritis!**

GRENJO: Bone, bone! — Skudritis! He, Skudritis!

DUA SCENO

Venas Skudritis. La samaj

SKUDRITIS (ridante): **Ĉi tie ja mi estas!**

JAKUBOVSKI: Kion? Vi estis ĉi tie kaj kaŝe aŭskultis, sed ne venis, kiam mi vin vokis? Kion?

SKUDRITIS: Nu, nu, ne koleriĝu! — Mi deziris diri: ne ĉi tie mi estas, sed ĉi tien mi venas.

JAKUBOVSKI: Kiel? Vi aŭskultis kaj tamen neas?! (Eksaltas de la seĝo kaj kaptas je sabro en la ingo.)

SKUDRITIS: Silentu! Silentu! min ne batu. Vi havas alian bataĵon, mi jam scias.

GRENJO: Kiu ĝi estas?

JAKUBOVSKI: Iru! Ne estas via devo ĉi tie aŭskulti. Ni deziras esti nur duope.

GRENJO: Ha! Interbatiĝis! — Pro iu knabino!

JAKUBOVSKI (rigardas ŝin obtuzete).

GRENJO: Bone, bone — mi jam iras.

TRIA SCENO

Jakubovski kaj Skudritis

JAKUBOVSKI (insultas, skuante Skudritis): Trioble naŭ diablaj fulmoj! Malbenata! En fundon mem de la infero! Sed mi cin kaptos! Netuŝinta de mi ci ne foriros!

SKUDRITIS (forskuiĝas de li kaj manetendante al vino): Atendu, atendu! — Diablo ŝin prenu! — Lasu al mi antaŭe drinki. La buŝo tute sekiĝis dum mi postkuris vin.

JAKUBOVSKI (mallaŭte): Ĉu vi sukcesis? Ĉu vi diris al Maija, ke mi urĝe devas kun ŝi paroli ion gravan?

SKUDRITIS: Mi diris, diris! Kial ne diri? — Mi sukcesis, — kial ne sukcesi.

JAKUBOVSKI: Nu?

SKUDRITIS: Vere ŝi estas ora panienka! Similan oni ne trovos; ŝi estas kvazaŭ anĝelo — —

JAKUBOVSKI: Kion vi, malsaĝulo, scias? — Nu kio? Kion ŝi diris?

SKUDRITIS: Mi bone scias, kvankam mi estas malsaĝulo.

JAKUBOVSKI (maltrankvile ekmoviĝas kaj rigardas lin).

SKUDRITIS: — Ŝi mem estas pensinta pri tio — kaj estas parolinta kun Frida — kaj Frida kun vi — kun vi parolos; ŝi estos antaŭ tagmezo en tiu ravineto — ŝi havas ion gravan por diri al vi.

JAKUBOVSKI: Kion tio signifas? Kion ŝi havas por paroli kun Frida? Mi deziras paroli kun ŝi mem, ne kun Frida.

SKUDRITIS: Jes, mi ne scias, kion tio signifas. Sed ŝi, panna Maija, estis tre afabla kaj ridetis kaj — —

JAKUBOVSKI (mallaŭte): **Kion? Ŝi, ŝajnas, ridis pri mi? Ŝi ŝatas ŝerci. — Ŝi deziras min frenezigi? — Sed mi ŝin kaptos! Al diablo! Mi ŝin ricevos! — Heil devas malaperi!**

SKUDRITIS (laŭte): **Jes, Heil devas malaperi!**

JAKUBOVSKI: **Silentu, malsaĝulo!**

KVARA SCENO

La samaj. Venas kelkaj soldatoj kaj oficiroj. Ĉiu grupo eksidas aparte. Venas Grenjo kaj servas ilin

JAKUBOVSKI (intersalutas kun la oficiroj, sed ne eniĝas en konversacion; eksidas denove ĉe la tableto; Skudritis eksidas pli malproksime de li): **Saluton! Saluton! Saluton!**

IU OFICIRO EL LA SVEDOJ: **Sinjoro standardjunkro ne havas bonan humoron.**

ALIA OFICIRO: **Eĉ nia ĉarma vinportistino Grenjo ne povas lin gajigi.**

LA UNUA OFICIRO: **Ne nomu ŝin Grenjo! Ŝi ja estas panna Malgojata. — Panna Malgojata, alpremu al nia vinpokalo viajn rozilorantajn lipetojn, kiuj estas pli ruĝaj ol vino kaj pli varmegaj —**

JAKUBOVSKI (etendas al ŝi sian pokalon): **Pli varmegaj ol tindro de fusilo.**

LA UNUA OFICIRO: **Sinjoro standardjunkro, kiel vi kuraĝas miksiĝi en mian parolon?**

JAKUBOVSKI: **Jen! sinjoro oficiro, mi kuraĝas, — Malgojata, montru kiel paias de vi ekbruligita fusilo!**

GRENJO (en timo): **Sinjoro junkro! Sinjoro junkro!**

JAKUBOVSKI: **Puŝu flanken lian pokalon kaj venu al mi!**

GRENJO (flankenpuŝas la etenditan manon de la oficiro, la vino el la pokalo elverŝiĝas; ŝi rapidas al Jakubovski).

JAKUBOVSKI: **Donu al mi viajn lipojn!**

GRENJO (ĉirkaŭbrakas lin, sed Jakubovski flankeniĝas kaj forigas ŝin de si).

JAKUBOVSKI: **Ĉu vin, sinjoro oficiro, kontentigis la respondo?**

LA UNUA OFICIRO (saltleviĝinta kaj kaptinta la sabringon, eltiras la sabron, alproksimiĝante al Jakubovski): **Mi vin tuj surloke puninstruos.** (Ĝenerala granda tumulto.)

LA DUA OFICIRO (tuj sekvas lin kaj invitas la ceterajn oficirojn, kiuj detenas la unuan): **Paciĝu! Paciĝu! lasu lin! — Venu, ni foriru!**

LA UNUA OFICIRO: **Mi deziras lin puni, la polan sentaŭgulon! La transkurinton! La perfidulon!**

JAKUBOVSKI (restas trankvile sidante, ĉirkaŭbrakas per unu mano Grenjon, incitante sian kontraŭulon): **Ĉu vi, sinjoro oficiro, povas min puninstrui, se vi mem ankoraŭ ja ne scias reglamenton: al ni estas severe malpermesite interbatali! Kaj due — estas severe malpermesite pliakrigi interrilatojn inter diversnaciaj oficiroj kaj soldatoj. — Ĉu nun al vi sufiĉas?**

LA UNUA OFICIRO (kiun retenas liaj kolegoj, ĵetiĝemas al Jakubovski, sed oni forkondukas lin): **Ci pola marodulo! Ci militkampa rabisto!**

JAKUBOVSKI (ridetante): **Unu koron de vi, sinjoro oficiro, mi rabis!**

OFICIRO: **Vi malĉastulo! Vi malĉastulo! Vi senhonoriganto de knabinoj!**

JAKUBOVSKI: **Vi, sinjoro oficiro, estas instruita pri ĉiuj delikataj kutimoj. — Ĝis revido, sinjoro oficiro!**

OFICIRO: **Transkurinto! transkurinto! transkurinto!** (Lin oni forkondukas. — Li elŝiriĝas kaj realkuras al Jakubovski.) **Ci estas volonta je interbatiĝo, sed cin Heil ekbatis kaj ci tiam forkuris de ĝardenista knabego! de plugisto! de kampulo ci forkuris.** (Li rapide foriras.)

JAKUBOVSKI (eksaltinta kaj eltirinta la sabron el ingo): **Halt'! — donu al mi la kontentigon.**

LA DUA OFICIRO: **Paciĝu, sinjoroj! Paciĝu!** (La oficiroj stariĝas inter la kverelantoj; la unuan oficiron rapide oni forkondukas. Li foriras venke ridante. Ĉiuj oficiroj foriras.)

KVINA SCENO

La samaj, sen oficiroj

JAKUBOVSKI (batante per la sabro sur tablon): **Mi devas ricevi kontentigon! — Mi ricevu kontentigon! Tiuj malbenitoj! — Satano kaj la svedo! Mi jam tiun bandon ekskuos!**

SKUDRITIS (sin ŝovas denove al Jakubovski): **Ni ilin ekskuos, la diablojn! — Jes, sed kiel?**

IU SERĜENTO (el la lokaj): **La svedoj estas tro fieraj kaj malhumilaj! — Ne sole nur ili estas oficiroj kaj soldatoj! Neniam ili estus venkintaj la polojn, se ni ne estus iliaj militintoj. Nun ili estas pretaj ofendi ĉiun, kiu ne agas laŭ ilia volo.**

SKUDRITIS (eksidas denove apud Jakubovski): **Sed kion oni faru? Kio do kuraĝas ilin ataki. Bone, ke pan Jakubovski havas tian forton, kian havas neniu en la mondo. De la pan ĉiuj timas. Sed kion oni faru al Heil? Plendi al pan Ŝildhelm oni ne povas, li rompis piedon kaj kuŝas en lito.**

IU LOKA SOLDATO (ŝercas): **Nu, plendu al sinjorino, ŝi ja regas anstataŭ la sinjoro.**

SKUDRITIS: **Nu plendu, plendu, se pani[1]) defendas Heil kaj Heilego kochanka'n[2]).**

JAKUBOVSKI (kiu sidis malbonhumora ekmurmuregas).

SKUDRITIS (subite kunetiriĝas pro timo kaj eksilentas): **Mi nenion, — mi nur simple. —**

IU SOLDATO (moke al Skudritis pro liaj polaj esprimoj): **Ne tuŝu Heilego koĥanka'n, ŝi ja estas Maija, fianĉino de Heil. Tiam pli bone tuŝu Heil mem, se vi lin ne timas.**

SKUDRITIS: **Timi, ne! Ni timas neniun!**

SOLDATO: **Vi ne timas, sed ci — jes. Ĉu ci ne povus al Heil sekrete difekti iun artikon?**

SKUDRITIS: **Mi povus, povus, — mi jam diris — sed oni ekscios — — —**

ALIA SOLDATO: **Oni ekscios kaj vin oni tiam servliberigos, sed la poloj akceptos vin nur por malliberejo.**

SKUDRITIS: **Ni, panowie[3]), ni iru aliloken — — —**

ALIA SOLDATO: **Panove, panove! — Nu kiaj vi estas pan'oj kaj sinjoroj!**

IU ALIA: **Kiam ĉi tiuj panove regis ĉe ni, tiam estis ankoraŭ pli malbone ol nun kun la svedoj. Svedoj konfesas la kampulon almenaŭ homo, sed kion faris la polaj sinjoroj?**

JAKUBOVSKI (ekmurmuregas): **Vi estas nur bydlo[4]).**

IU SOLDATO: **Ĉu vi aŭdas! Bidlo — estas brutaro, la kampulo ne estas homo, sed bruto!**

JAKUBOVSKI (ekbatas per pugno sur la tablon): **Silentu! — Malgojata — vinon!**

GRENJO (alportas vinon kaj ekstaras apud li, lin trankviligante): **Kial vi koleriĝas pro ili! Kion ili povas al vi fari? Ili ĉiuj timas de via forto. Vi estas la reganto.**

SKUDRITIS: **Ŝi bone diras: Ci, pan, jasnowielmożny![5])**

JAKUBOVSKI: **Kie restis panna Greifowna?[6]) Ŝi ja ĉiutage venas ricevi vinon por maljuna Greif.**

GRENJO (malbonhumore): **Kion vi de ŝi havas? Al vi ŝi ja ne venas. Ĉi tien venas aliaj knabinoj, bele-belaj, elektu el ili.**

---

[1]) pani (elp. panji) (pole) — sinjorino.
[2]) Heilego koĥanka (pole) — amatino de Heil.
[3]) panowie (elp. panove) (pole) — sinjoroj.
[4]) bydlo (elp. bidlo) (pole) — brutaro.
[5]) jasnowielmożny (elp. jasnoveljmojnij) (pole) — moŝta.
[6]) panna Greifowna (pole) — fraŭlino Greif.

Tuj ili venos, je ĉi tiu tempo ili devas veni. Kion vi en Maija ektrovis? Ne estas ja ŝi io eksterordinara, simple knabino! Ĉu ni, la ceteraj, ne estas pli belaj? Sed mi scias: ŝi vin rifuzas kaj nun vi pro la kolero ne scias kion fari. Saĝa ŝi estas. Ju pli malmulte oni al vi donas, des pli bone, sed mi vin tre bone servas kaj vi min neniom konsideras — — — sed mi — — —

JAKUBOVSKI: Silentu do! Ho, tia longa babilado.

GRENJO: Tie venas jam la bienaj knabinoj. Nun vi povos elekti por vi laŭ plaĉo.

JAKUBOVSKI (malbonhumore): Iru!

SESA SCENO

Enkuras amaso da knabinoj, la plej multo kun kruĉoj; inter ili estas ankaŭ junaj fraŭloj kaj aliaj bienaj servistoj, venantaj ricevi bieron kaj vinon

KNABINOJ (disiras tra la tuta korto, demetas la kruĉojn apud drinkeja tablo por plenigo; kuradas tra la korto, ŝercas kun militistoj kaj popolanoj, kantas diversloke):

ONI KANTAS:

Tagmezo, tagmanĝo
Homojn venigu
De l' kampo, laboro,
De loko-lokoj.

FRAŬLOJ (kantas):

Tagmezo, tagmanĝo
Donu frandaĵon, —
Donu pli dolĉan
Knabinon kiseblan.

KNABINOJ (kantas):

Tagmezo, tagmanĝo
Al vi oni donu
Osteton manĝeblan
Bovinon kiseblan!

FRAŬLOJ (kantas):

Tagmezo, tagmanĝo
Al vi oni donu
Kaĉeton acidan
Fraŭletojn amnaŭzajn.

KNABINOJ (kantas):

Tagmezo, tagmanĝo
Repacon ni volas,
Fraŭlinoj kaj fraŭloj
Aminde parolu!

POPOLANOJ (stariĝas en grupoj kaj partiĝas, babilas, drinkas kaj manĝas, kantas).

SEPA SCENO

Venas sveda leŭtenanto, iomete ebria, tuŝas la knabinojn, kiuj evitas lin, sed timas al li kontraŭstari

LEŬTENANTO: **Ĉiuj knabinoj estas miaj; kiun mi deziras, tiun mi prenas!** (Kaptas unu knabinon kaj kisas ŝin.)

LA KNABINO: **Sinjoro leŭtenanto, lasu min! Mi ne havas tempon, mi devas porti bieron al mia mastro.**

LEŬTENANTO (ne lasas ŝin): **Mi havas tempon, kaj vi por mi ankaŭ devas havi ĝin.**

LA KNABINO (ekkrias): **Ho, sinjoro leŭtenanto!**

JAKUBOVSKI (saltstariĝas kaj alkuras la leŭtenanton): **Vi liberigu la fraŭlinon tuj — aŭ mi vin — — —!**

LEŬTENANTO (eltiras sabron): **Mi al vi montros! Mi vin instruos!**

JAKUBOVSKI: **Por puninstrui min, vi, sinjoro leŭtenanto, devas havi pli altan rangon. Tiurilate mi povas al vi helpi.** (Li kaptas la leŭtenanton kaj surĵetas lin sur pli altan rokrandon.)

LEŬTENANTO: **Ve! Ve! Savu min! Vi faras perfortaĵon. Vi respondos pri tio!** (La leŭtenanto en konfuza situacio, time penas malsupreniĝi.)

POPOLANOJ (ridas): **Sinjoro leŭtenanto estas plialtigita al rango de superleŭtenanto! — La polo estas pli bona homo: li helpas al proksimulo! — Kiu alten saltas, tiu malalten falas! — Leŭtenanto suprengrimpas al sunfilinoj, por li la terknabinoj ŝajnas tro simplaj! —**

LEŬTENANTO (malsupreniĝinta, al Jakubovski): **Mi vin punos! La punon vi ne evitos!**

JAKUBOVSKI (ironie): **Sinjoro leŭtenanto, vi la unua eltiris la sabron! Tio estas severe malpermesata! Vi mem povas esti punota. Mi ne levis la sabron kontraŭ vi. Mi levis nur vin mem.**

LEŬTENANTO (minacante rapide foriras): **Vi ĉiuj min rememoros.**

OKA SCENO

La samaj, sen la leŭtenanto

POPOLANOJ: **Tio estis bone farita! La sinjoreto estas bone ridindigita! — Li plu ne tuŝos niajn knabinojn!**

FRAŬLINOJ (unu post la alia): **De li oni ne povas saviĝi! Li gluiĝas kvazaŭ kardo al blanka lano! — Se li estus eĉ iom pli belstatura! — Tia malbona odoro el la buŝo! — Vi ja tion scias! — Kaj ĉu vi ne scias? —**

GRENJO: **Vi ĉiuj ŝuldas dankon al sinjoro Adamo, kiu vin liberigis de la malgraciulo.**

FRAŬLINOJ (amasiĝas al Jakubovski kaj ĉirkaŭas lin): **Nian Adaĉjon oni povas kisi! — Nia Adaĉjo! — Jes, nia Adaĉjo estas brava knabo. — Ni karesu nian pan! — Kaj kia li estas fortegulo!**

IU EL KASTELANOJ: **Li regalu nin per vino kaj dolĉaĵoj, mono al li ne mankas.**

ALIA: **Sufiĉe li estas kolektinta de vivaj kaj mortintaj, en militkampoj.**

GRENJO: **La enviulo ne havas centimojn por regalo.**

IUJ VOĈOJ: **Vere! Se nur oni havas centimojn por regali, tute egale, kiamaniere ili estas akiritaj. — Ŝteli ne estas peko, se oni nur ne kaptas. Ne estas peko preni monon de iu ajn, se tiu ne kontraŭdiras. Unue viron mutigu, tiam prenu, kiom vi deziras. La vojo estas longa kaj larĝa, monon oni povas trovi.**

JAKUBOVSKI (cinike): **Ĉifonistoj, kion vi kuraĝas al mi diri? Kiu vidis, ke mi rabis? De vi ja mi ne rabos, vi havas nenion,— malantaŭ via ĉemizo estas ne mono, sed insektoj.**

FRAŬLINOJ (ridas).

IU EL KNABINOJ: **Kiu ne irus volonte rabi, se li nur havus kuraĝon?**

GRENJO: **Milita tempo. En milito akirita havo ne estas rabaĵo.**

VOĈO DE POPOLANOJ: **Ne estas plu milito! En paca tempo oni ne rajtas rabi.**

JAKUBOVSKI (ridante): **Kiu scipovas kanti mian kanton?**

SKUDRITIS (duondancante, duonkantante):

Mon' al bravulo
Inoj kaj ĝuo
Vin' al bravulo
Enviu timulo.

NAŬA SCENO

En fino de scenejo malantaŭ popolanoj aperas Maija

POPOLANOJ (kiuj estas pli proksime al Maija, eksilentas, inter aliaj tumulto, kies kaŭzon ne komprenas la antaŭe starantaj. Mallaŭte): **Pli mallaŭte, pli mallaŭte! — vi tie!**

POPOLANOJ (en mezo de scenejo, unu post alia, mallaŭte): **La kastela sekretario? — Ne, ne, la sinjorino mem! — La inspektisto? — Cit! cit!**

JAKUBOVSKI (kiu sidis liberpoze, en fiera sinteno, subite eksaltas kaj forŝovas de si la knabinojn; ektimiĝinta li silentigas la ĉirkaŭantojn): **Silentu! Silentu! Venas estraro!**

VOĈO EL POPOLANOJ: **Ektimis la granda heroo! — Ke la estraro nur ne forpelu lin de la ofico!**

POPOLANOJ (ridas): **Jen, kia pan! Jen, kia pan!**

ALIAJ VOĈOJ EL POPOLANOJ: **He! Maija! Maija! — Silentu! — Silentu! — Kion vi ektimis?**

MAIJA (veninta antaŭen, portante en la mano vinkruĉon, al popolanoj): **Pro kio vi tiel ektimis?**

IA VOĈO: **Ni opiniis, ke venas la sekretario aŭ la sinjorino.**

LA ANTAŬA VOĈO: **De kiu do ektimis kaj forkuris la heroa pola pan? De virino.**

POPOLANOJ (denove ridas ankoraŭ pli laŭte).

IA VOĈO: **Panie[1]), kuru! panie, kuru! — Panowie do lasu[2])! — Kuru en arbustojn!**

JAKUBOVSKI (kolera pro sia ektimo): **Psiakrew! — Silentu vi sentaŭguloj! Kial ridi!** (Sin deteniĝante kaj direktante la situacion je sia bono, alproksimiĝas al Maija, profunde klniĝante). **Tre estimata fraŭlino! Permesu al mi saluti vin kiel estrinon. — Ĉiuj popolanoj respektplene eksilentis vin ekvidante. Ni ektimis, ke vi surprizis nin dum tre liberaj interparoladoj. Ni petas vian pardonon.**

IA VOĈO: **Li ektimis, opiniante, ke venas estraro kaj lin punos pro nekonvena konduto, aŭ eĉ forpelos.**

MAIJA: **Pardonu vi, sinjoro leŭtenanto, ke mi maltrankviligis vin en tia gaja kompanio. Mi vere ne deziris forpeli fraŭlinojn el viaj ĉirkaŭbrakoj. Mi venis nur al Grenjo por ricevi vinon.**

JAKUBOVSKI: **Ne moku min, Maija. Mi vin adoras. Mi vin adoras!** (Li metas sin sur unu genuon.)

MAIJA: **Mi vidas, vi ŝatas ŝercojn, sinjoro leŭtenanto. Sed la ŝercoj estas tre banalaj. Adiaŭ, sinjoro leŭtenanto, daŭrigu la ŝercadon.** (Flankeniĝas kaj intencas foriri.)

JAKUBOVSKI: **Ne iru, ne foriru! Mi plu ne ŝercos. Mi promesis al vi. Ĉi tiu estis neatendita okazo, ke la knabinoj, — la fraŭlinoj venis kaj ĉirkaŭis min. Mi savis ilin de malagrablaĵoj.**

IU EL KNABINOJ: **Jes, jes, pan Adamo gardis nin kontraŭ altrudoj de unu oficiro.**

ALIAJ: **Jes, jes, ŝi diras veron. — Ni dankis lin.**

MAIJA: **Mi ja ne deziras malhelpi vin. Vi daŭrigu danki!**

JAKUBOVSKI: **Maija, vi ne kredas min. Vi opinias, ke mi denove iĝis drinkulo kaj distriĝulo. Mi pruvos, ke vi eraras. Kaj vi ekvidos, ke mi estas pli bona, ol vi pri mi pensas. Tuj mi pruvos. Aŭskultu, fraŭlinoj! — Nu, vi knabinoj! Ĉu vi aŭdas, kiam mi al vi diras!?**

KNABINOJ (stariĝintaj post li): **Nu, nu! — Diru, diru!**

---

[1]) panie (elp. panje) pole — sinjoroj.
[2]) Panowie do lasu (elp. ljasu) (pole) — sinjoroj en arbaron!

JAKUBOVSKI: Vi ĉiuj, kiuj premiĝas al mi! Kiuj min ĉirkaŭas, kiel abeloj la mielon! Vi ĉiuj, kiujn mi gardis kaj kiuj kaŭzas al mi malbonan gloron ĉe mia korreĝino, je kiuj ŝi ĵaluzas, — vin ĉiujn mi liberigas de la obeo al mi. Vi ĉiuj ne devas al mi plu servi per la afableco kaj humileco! Mi akceptos plu neniun kison, neniun kareson de vi!

KNABINOJ (reciproke): Kio okazis al Adaĉjo? — Kial vi tiel bruas? — Ni devas lin trankviligi! — Ni devas lin trankviligi kaj karesi! — Kion! Ŝi sola ekpensis esti pli bona ol ni ĉiuj!

MAIJA: Vane vi forlasas viajn korteganinojn, sinjoro leŭtenanto! Mi eĉ ne pensas esti ĵaluza. Vi ne estas kompreninta eĉ unu mian vorton! Mi ne akceptis vian proponon kaj akceptos ĝin neniam. Mi estas ligita kaj vi, sinjoro, estas al mi indiferenta. Mi pensis helpi al vi en duboj de via animo kaj nescio, — sed vi miskomprenas min. Vi terentiras miajn pensojn kaj deziras ilin egaligi al la viaj.

JAKUBOVSKI: Maija! Maija!

MAIJA: Ĉi tiujn belulinojn vi vane kulpigas kaj malindigas. Ili cedas al vi pro virina afableco, per tuta pardonemo kaj bonfaremo. La milda koro de virino sentas de si mem, kie troviĝas iu malfeliĉulo kaj rapidas helpi lin per siaj neelĉerpeblaj bonkoreco kaj nobleco kaj profundaj fontoj de abnegacio. La diinecan amon de virino vi neniam komprenis. Vi eĉ neniam deziris ĝin kompreni. Via metio estas la plej terura kaj vulgara, kia ajn povas esti. Kaj vi eĉ fieras tion. La milittempoj ankoraŭ daŭras en via koro kaj animo, kaj vane la virinoj penas revenigi la viron al paco kaj homeco. Danki kaj adori vi devus viajn adorantinojn, sed ne riproĉi ion al ili. La mildeco kaj la bono devas venki kaj savi.

KNABINOJ: Vere, vere! Ĉu vi aŭdas, Adaĉjo? — Ho, kion ŝi fantazias! — Ne, vere, vere!

IU KNABINO (venas al Maija): Vi, Mainjo, diris tiel, kiel estas. Mi ankaŭ same sentas, sed mi nur ne sciis tiel diri.

KNABINOJ (disputas inter si, ridas kaj ŝercas, kelkaj konsideras ĝin kiel koketecon): Bone diras Maija. — Jes, jes, ni ja estas bonaj, sed fraŭloj malbonaj. — Tion ni ĉiam diris. — Vi, viroj, estas tro vulgaraj kaj simplaj. — Maija diris bonan predikon. —

IU KNABINO: Aŭskultu, Adaĉjo, instruon. Ankaŭ mi tirados viajn longajn lipharojn, ke vi boniĝu!

JAKUBOVSKI (ŝin vulgare forpuŝas, tiel ke la knabino faletforiras kaj ekploras): For, ci ranido!

FRAŬLOJ: Bonaj ja vi estas. Vi postkuras kiel ŝafoj. — Kian estimon oni povas havi por tiaj? —Kaptu nur kvazaŭ perdrikon, ke la plumoj disŝvebu. — Se vi estus tiaj, kia estas Maija!

KNABINOJ (malgaje): Kiel knabinoj ni ridas, sed la tutan vivon kiel edzinoj ni devas plori. Kion rakontas mia patrino! Se vi tion scius!?

FREMDA VOĈO EL POPOLANOJ: **Ni scias, scias ĉiuj. Ve! Ve! Ve!**

MAIJA: **Amikinoj, mi iras!**

KNABINOJ (ridas): **Iru, iru! — Kiu al ni nun predikos? — Kiu fraŭlojn nun admonos? — Adaĉjo, donu al ni ian guteton da vino, la buŝo sekiĝis de predikado. — Donu al Maija ankaŭ.**

JAKUBOVSKI: **Maija! Do vi ne kredas, ke mi parolas serioze? — Vi ankoraŭ estas ĵaluza? — Vi deziras esti la sola reĝino? Jen, mi igos vin la sola estrino: la bono kaj mildeco devas venki! Do rigardu: vi venkis!**

KNABINOJ (flustras timeme): **Kion li deziras fari? — Kion li ekpensis? —**

JAKUBOVSKI (eltiras la sabron el sabringo kaj, prenante la sabringon, svingas ĝin en aero): **Jen, per ĉi tiu mi disigos kaj forpelos de mi ĉiujn viajn rivalinojn! Rigardu, Maija!** (Li brutale ekbatas ĉirkaŭ li starantajn knabinojn, kiuj tumulte kuras diversflanken kaj kaŝiĝas post la fraŭloj.)

KNABINOJ: **Ve! ve! — Ĉu li freneziĝis? — Ho, vi despoto!**

FRAŬLOJ (ĵetiĝas inter ili kaj penas deteni Jakubovski kaj ŝirmi la knabinojn): **Sentaŭgulo! — Kion li ekpensis? — Tenu lin!**

MAIJA (ekkrias kaj kuras al Jakubovski kaj penas eltiri el liaj manoj la sabringon): **Ve! Ve! Kion vi faras?! — Besto vi estas! Sovaĝa lupo el arbaro!**

JAKUBOVSKI (ridante ekhaltas kaj tiam subite kaptas venintan al li Maija'n): **Nu, vidu! Vi mem venas al mi, mia reĝino! mia sola korreĝino! — Nun vi kredas, ke mi forlasas ĉiujn miajn adorantinojn kaj prenas sole vin! La bono devas venki! — Ha, ha, ha! — Akceptu nun vi sola ĉiujn kisojn, kiuj suiĉis por tiom multe da viaj rivalinoj! Hej! panna Maija, panna moja! moja! moja!**

MAIJA (kiu la tutan tempon penadis sin liberigi de Jakubovski, eltiriĝas el liaj manoj kaj vangofrapas lin): **Sentaŭgulo vi estas! Bestan vi havas naturon! — Mi opiniis vin pli bona. En vi estas nenio de bono kaj ĉarmo! Vi povas pri tio nur ridi. Neniam vi komprenos homon, vi, besto. Vi estas al mi fremda! Fremda!**

POPOLANOJ: **Forkuru! Maija! Forkuru!**

JAKUBOVSKI (staras komence konfuzita, tiam sin ĵetas post Maija. Popolanoj staras sur lia vojo, militistoj etendas kontraŭ li siajn armilojn): **Mi vin kaptos! — Mi vin ricevos! — Vi de mi ne forkuros! Vi estos mia!** (Maldolĉe ridante.) **La bona! la ĉarma! — Serpento vi estas!**

MAIJA (forkurante): **Fremda! fremda! fremda!**

DEKA SCENO

La samaj. Sen Maija

JAKUBOVSKI: **Serpento! — La glata! Serpento! — La saĝa!**

POPOLANOJ: **Ŝi estas anĝelo!**

JAKUBOVSKI (en miskompreno): **Ŝi estas anĝelo?!**

POPOLANOJ: **Ŝi estas bona! — Ŝi estas sankta! — Ŝi estas anĝelo!**

JAKUBOVSKI (subite komprenante kaj ankoraŭ pli ekscitiĝante en kolero): **Se ŝi estas anĝelo, nu tiam vere diablo prenos la anĝelon! Mi ŝin ricevos! Ŝi estos mia! — Ĉu vi aŭdas: vi estos mia! Vi estas nur virino, sed mi estas viro. Vi tion eksentos! Se vi estas anĝelo kaj mi estas diablo, tiam mi ankaŭ vin igos diablo! Vi estos mia kaj poste vi iru al anĝeloj kiom vi deziros. Makulitan kaj diabligitan la anĝeloj vin forpelos kun honto returne al mi! — Vi estos mia! Aŭdu!**

VOĈO DE IU KNABINO: **Diablo ne venkos la anĝelon! Popolanoj, karaj popolanoj, savu la anĝelon kontraŭ la diablo!**

INTER POPOLANOJ (iu ridas): **Ha, ha, ha! Malsukcesis la granda heroo, knabina ĉasisto!**

JAKUBOVSKI (en granda kolero sin ne regante): **Silentu, vi vizaĝaĉoj!** (Ne povante sin deteni kaj deŝarĝi sian eksciton, eltiras la sabron kaj disbatas tablon kaj benkojn.)

POPOLANOJ (jen forkuras, jen penas lin ekteni).

VOĈO DE LA SAMA KNABINO: **Kiel ajn la diablo furioziĝu, la anĝelon li ne venkos! Ĉiuj sanktuloj tion ne permesos!**

JAKUBOVSKI: **He! Kie estas la sankta? — He! Vin mi bezonas! — Donu ŝin al mi! — Mi mian koleron devas trankviligi! — He, he, he! — Nu ne! — Venu, vi sankta, kvietigu la malbonan spiriton! — Nu, la bona kaj la ĉarma, venu venki!**

KNABINO (time kaŝas sin post la popolanoj): **Ve! ve! Savu min! — Ne permesu al la besto disŝiri min!**

JAKUBOVSKI (subite sin ĵetas al la knabino kun armilo en la mano): **He! he! Ĉi tien!**

POPOLANOJ (cedas kontraŭ la armilo de Jakubovski; kelkaj kvankam kontraŭstaras, Jakubovski tamen kaptas la knabinon kaj tiras ŝin kun si).

JAKUBOVSKI: **Venu vi anstataŭ ŝi! Vi defendantino de la anĝelo! Estu vi unue mia kaj tiam via anĝelo! He, he, he!** (Li, fortirante la knabinon, kiu forte kontraŭstaras, malaperas post la scenejo. Ankoraŭ kelkan tempon oni aŭdas kriojn kaj helpvokojn de la knabino.)

(La popolanoj estas ekscititaj.)

DEKUNUA SCENO

Restis nur Grenjo kaj Skudritis; ĉiuj ceteraj foriris

SKUDRITIS: Tiu estas vera pan, jasnowielmożny pan! Szlachetny[1]) pan!

GRENJO: Nu, kion ĉiuj viaj pan'oj?! Adaĉjo: li valoras pli multe ol ĉiuj pan'oj kaj sinjoroj kune. Kia vasta mansvingo!

SKUDRITIS: He, he! mansvingo! Kiel li ĉiujn fraŭlinojn disjetadis. Kvazaŭ vento erioforan lanugon sur herbejo. Kiel li la svedon kvazaŭ fabosakon jetadis!

GRENJO: Tiaj fortaj manoj! Knabinoj en liaj manoj balanciĝas kvazaŭ en printempaj balanciloj. Kiu knabino ne dezirus tie ĝojiĝi! Ĉiuj al li estas kvazaŭ floroj al abelo. Al mi nur ne plaĉas, ke li Maija'n tiel dorlotas. Kion li atingis per tio.

SKUDRITIS: Ho, kion! la vangfrapon! — Ĝi estas nenio. De ĉarma maneto povas veni nur kareso, kiel ajn forta ĝi estu. Panna Maija estas ja nur panienka!

GRENJO (malpacience): Denove li per sia pola lingvo intermiksiĝas!

SKUDRITIS: Nu, tiel ĉarma estas panienka Maija, tiel bona, kiel la sankta Varvara! Ili ambaŭ harmonias kune — pan Adamo kaj pani Maija.

GRENJO: Nu, jes, jes; mi ja ankaŭ ne kontraŭdiras, bela kaj bona ŝi estas, sed mi nur bedaŭras, ke ni, la ceteraj, restas en mallumo!

SKUDRITIS: Tio ne gravas! Ĉu ni la ceteraj viroj ankaŭ ne restas en mallumo? Kaj tamen estas bone, ke el la mallumo oni povas suprenrigardi, kaj tie supre oni vidas plenan brilan lunon.

GRENJO (lin interrompante): Kaj apud la plena luno malgrandan, sed brilan, brilan steleton! Mi ja ĝi ne estas; sed tio ne gravas!

SKUDRITIS: Kaj ĉi tiu malgranda, brila steleto brilas ankaŭ tiam, kiam la granda luno komencas konsumiĝi kaj malaperi. Ho, la panna Maija, mi dezirus al ŝi kandeleton eklumigi kaj — kaj — tion ja oni ne povas, ŝi ja estas ankoraŭ viva.

GRENJO: Kion vi deliras? Kial ŝi ne estu viva?

SKUDRITIS: Mi nur tiel — al mi ŝajnas, — ŝi ne devas vivi, — kiel ni ĉiuj, por penti la pekojn — sed Heil ŝin — — —

GRENJO: Nu? — Kion? ŝin?

SKUDRITIS: Mortigos ŝin.

---

[1]) Szlachetny (elp. ŝljaĥetni) (pole) — nobela.

GRENJO: Vi deliras! deliras! Heil estas bona homo; vi ĉiuj nur lin furiozigas. Li estas malfeliĉa! Kiel ni ĉiuj. Li havas neniun kun kiu paroladi. Li estas orfo. Kaj ĉi tie ĉu ni sentas nin pli bone? Ĉu kun tiuj drinkuloj oni povas paroli. Kun vi mi povas interŝanĝeti iun vorteton. Pri la sama nia Adaĉjo. Vi ŝatas lin, mi ankaŭ.

SKUDRITIS: Ni havas pri kio paroli. — Vi ankaŭ ne ridas pri mi.

GRENJO: Sed mi lin tamen ne ŝatas, li estas tiel kolera, kaj malbona ankaŭ li estas. Homon mortigi li ankaŭ kapablas.

SKUDRITIS: Nu, tion ja povas ĉiu soldato.

GRENJO: Mi ne tion pensis — li estas tiel malbona kaj ŝi tiel bona —

SKUDRITIS: Tamen ili ne harmonias kune. Sed li nun estas tiom kolerigita — — — kio do nun okazos — — — se ĉio nur okazus bone — — —

DEKDUA SCENO

Venas Frida eliĝante el kaŝejo, aŭskultante kaj ĉirkaŭrigardante

FRIDA (moke): Kion do vi ĉi tie faras, du kolombetoj! Tiaj grasaj kolombetoj! Kion vi ĉi tie kveras: harmonias aŭ ne harmonias kune? Ili ne harmonias kaj ne estos kune! Mi zorgos pri tio! Ju pli sincere mi ilin konatigos, des pli fremdaj ili estos. Kial vi Skudritis, ĉi tie staras? Kion vi zorgis por via sinjoro? Mi venigis ĉi tien Maija'n, mi ĉion rigardadis kaj aŭskultadis. Mi ĉion aranĝis. Sen mi vi ĉiuj povus nenion. — Iru, invitu vian sinjoron al nia renkontiĝloko! Tuj! Diru, ke sole mi povas al li helpi. Iru tuj! Iru!

SKUDRITIS: Nu, nu, kial vi min tiel puŝas? Tuj!

FRIDA: Iru tuj!

SKUDRITIS: Mi iras, iras jam! (Foriras.)

GRENJO: Ne enmiksiĝu vi, Frida!

FRIDA: Ne enmiksiĝu vi, Grenjo!

Kurteno

DUA BILDO

Soleca roka krutvaleto ĉe kastelo Turaida

UNUA SCENO

Frida

FRIDA (sola, atendas Jakubovski): **Mi ricevos vin en miajn manojn. Sen mi vi povas nenion atingi. Mi akiros Heil kaj de vi mi ricevos la doton por nia edziĝo. Vi pagos plorante. Kion vi rabadis en milito, tion mi prenos de vi en paco. Mi ne timas, kiel vi, de sorĉistino en la kaverno de malbona feino. Mi forpelos vin en kavernon de Bonviro kaj tiu helpos al mi.**

DUA SCENO

Frida. Venas Jakubovski

FRIDA (moke, dezirante eksciti lian malamikecon kontraŭ Maija): **Ĉu vi nun kontentiĝis? — iomete? Ĉu la vango plu ne doloras? Ĉu vi surmetis plastron?**

JAKUBOVSKI (ekscitiĝante pri la moka ofendo, brutale): **Kion vi volas? — Kial vi ne venis pli frue?**

FRIDA: Mi venis pli frue kaj kaŝe aŭskultadis kaj rigardadis vian militon kontraŭ viranseroj kaj timemuloj, kiel vi brile venkis kaj poste ankoraŭ pli brile . . .

JAKUBOVSKI (brutale interrompas ŝin): **Haltigu la buŝon! Respondu nur, kion mi demandas al vi.**

FRIDA (ridas): **Jes, jes, mi haltigu la buŝon, kiam vi kun mi parolas! — Vi tre trankvile haltigis la buŝon, kiam oni batis ĝin.**

JAKUBOVSKI (subite kaptas ŝin kaj skuas): **Mi cin polvigos! Ci, ci!**

FRIDA: Via celo ja estis alian polvigi, ĉu vi nun de ĝi rezignis — kiam vi tion ne povas efektivigi.

JAKUBOVSKI (liberigas ŝin, rapide forpuŝante): **Iru al diablo!**

FRIDA: Ĉe li mi ja estas. Li nur montriĝas malgranda diablo, kiu povas nenion fari, sen helpo de la virino.

JAKUBOVSKI: Eĥ! Nu kion vi! Nenion vi estas farinta, kion mi ordonis! Ĉu tia estas helpanto? Ridindaĵo! Vi promesis inklinigi ŝin favore al mi! Kaj nun? Eĉ vi mem venis ne ĝustatempe. — Sed kion ŝi diris al vi, por sciigi al mi?

FRIDA: Kiam mi rigardas vin: tia belstatura viro, tia grandkreska kaj tiom — malmulte da saĝo!

JAKUBOVSKI (eksvingas manon por ŝin bati): **Kion vi kuraĝas, vagulino!**

FRIDA: Nu, ĉu vi ne estas malsaĝulo, se deziras bati min, kiu sola povas vin helpi!? — Kaj kia do estas la saĝeco, se vi ekpensas, ke ankoraŭ nun oni povus favorigi Maija'n al vi? — Kaj kia do estas la saĝeco, se vi ne komprenas, ke Maija vin nur ŝerctrompas, dirante, ke ŝi sendas min al vi? Ĉu vi ne scias, ke ŝi ĉiam havas en la kapo diversajn spritaĵojn kaj al vi ŝi kondutas, kvazaŭ al malsaĝa knabo, pri kiu oni ridas? — Nu? Kion? — Ne per bono vi povas ŝin admoni, sed nur per ruzo vi povas ŝin akiri.

JAKUBOVSKI: Mi ne bezonas vian ruzon. Se ne per bono, tiam per malbono kaj per forto mi ŝin ricevos.

FRIDA: Mi opinias, ke vi ŝin per forto ne ricevos. Por apliki forton, vi plu ne havas tempon.

JAKUBOVSKI: Kial? — La forto ĉiam havas tempon. — Se nur ŝi ie ekstere montriĝos, mi ŝin kaptos. Se ŝin akompanos iu amikino aŭ Heil, — mi superos ilin. Se ŝi restos en sia ĉambro kiel en malliberejo, mi dum nokto ŝtelos ŝin kaj forkondukos — kaj poste redonos, ke tiam prenu ŝin Heil. Mi ĉion pripensis.

FRIDA: Se oni vin kondamnas kaj forpelas? aŭ redonas vin al la poloj?

JAKUBOVSKI: Okazu kio ajn! mi mian deziras ricevi!

FRIDA: Kaj tamen vi vian ne ricevos! Ĉu vi scias, ke jam morgaŭ Maija kun Heil geedziĝos?

JAKUBOVSKI: Ha! — Tiaokaze mi la unua jam ĉi-nokte prenos ŝin, ke li edziĝu morgaŭ kun jam edzinigita virino!

FRIDA (ridas): Vi estas tute malsaĝa! — Ĉu vi havas militistaron, per kiu perforte penetri la kastelon? Ĉu vi pensas, ke ili ne konas vian perfortemon kaj ne estos singardaj? — Ĉu vi jam forgesis, ke vi mem ofendis svedajn oficirojn kaj ili ne indulgos vin, kaj eble jam ĉi-posttagmezon ili metos vin en malliberejon? — Mi bedaŭras, ke mi ekinterrilatis kun malsaĝa viro, kiu permesas al la pasio tiel mallumigi la prudenton.

JAKUBOVSKI (melankolie forturniĝas, eligas): Nu?

FRIDA: Mi diros, kiamaniere vi atingos la celon.

JAKUBOVSKI: Nu?!

FRIDA: Kion vi donos, se mi diros?

JAKUBOVSKI: Mi edziĝos kun vi.

FRIDA: Via edziĝo havas por mi nenian signifon plu. Ĝin mi jam havas. Kaj kun kiom da knabinoj vi jam edziĝis — kaj kun kiom vi ankoraŭ edziĝos? Kaj mi veran edziĝon, ne tian, kia estas via, povas akiri, kiom mi deziras. Min edziĝpetis eĉ pli bonaj viroj ol estas vi. Ne, tio por mi estas nenio. Vi devas doni al mi la doton, ke mi estu riĉa fianĉino, kiam mi edziniĝos.

JAKUBOVSKI: Kion vi deziras?

FRIDA: La valoran kolornamaĵon kun la ruĝaj juveloj.

JAKUBOVSKI: Tion mi ne povas.

FRIDA: Kial ne povas? Ĉu vi intencas donaci ĝin al Maija? Ŝi ĝin ne bezonas, se vi prenos ŝin perforte. — Sed mi vidas, ke sole per ĝi mi ne kontentiĝos, vi devos doni al mi ankoraŭ la belan perlaron, kiun vi prenis de kolo de litova vajvadienė[1]), post kiam vi mortigis ŝin. — Vi ja ricevos aliajn ornamaĵojn, kiam iros militi.

JAKUBOVSKI: Iru al diablo!

FRIDA: Bone, bone! Mi ja ne devas iri rekte al diablo, kun diabloj kaj sorĉistinoj de kaverno de malbona feino vi estas pli bone konata. Mi iros unue al Maija, tiam al svedaj oficiroj kaj post tiam al kastelestro Ŝildhelm.

JAKUBOVSKI: Bone, mi donos, kia estas via konsilo?

FRIDA: Donu tuj! Poste vi povas forgesi kion vi promesis.

JAKUBOVSKI: Ha, ha! Via konsilo povas esti ne taŭga, kaj mi ilin vane estos doninta al vi.

FRIDA: Ni faru tiel: metu la ornamaĵojn ĉi tie sur la ŝtonon, ke mi vidu, ke vi ilin ankoraŭ havas. Se mia konsilo estos bona kaj vi mem ĝin rekonos bona, tiam mi prenos ilin.

JAKUBOVSKI (eltiras el la brustpoŝo kaj metas ilin sur la ŝtonon): Nu diru!

FRIDA: Mi scias, kie Maija kun Heil renkontiĝas. Sendu al Maija sciigon, ke ŝi iru hodiaŭ, jam tuj post tagmezo, al tiu loko, kvazaŭ Heil havas al ŝi ion gravan por diri; pri la edziĝfesto oni devas paroli. Vi skribu leteron — vi ja scipovas iom skribi? — kaj mi portos ĝin al ŝi.

JAKUBOVSKI: Ŝi ne kredos.

FRIDA: Mi sendos ĝin per kuriero, al kiu ŝi kredos.

JAKUBOVSKI: Tion ankaŭ mi povas fari, por tio mi vin ne bezonas. Mi reprenas la ornamojn. Vi min deziris trompi, sed mi vin trompos, mi eluzos vian konsilon senpage.

FRIDA (ridas): Mi devas ridi pri via malsaĝo pli ol mi devus koleriĝi pri via fiago. Al via kuriero oni ne kredos. Kiu li estos? Skudritis? Aŭ iu knabino. Sed al mia kuriero ŝi kredos.

JAKUBOVSKI (redemetas la ornamaĵojn): Nu?

FRIDA: Mi sendos malgrandan Lenjon, ŝian duonfratineton. Vi ŝin neniam instigos, sed al mi ŝi estas amikino. — Nu, ĉu estas bona konsilo?

JAKUBOVSKI (ĝoja): Bona konsilo! Prenu la ornamaĵojn. — Mi aldonas ankoraŭ ĉi tiun ringon. (Rapide ĉirkaŭprenas Frida'n.)

FRIDA: Nu jen, — mi estas al vi la sola amikino: donu ankoraŭ iun ringon.

JAKUBOVSKI: Sufiĉas!

---

[1]) Vajvadienė (litove) — edzino de guberniestro.

FRIDA (forturniĝas): Mi povus doni al vi ankoraŭ iajn konsilojn. — Kaj sola sen mi vi nenion sukcesos. Trompi vi min ankaŭ ne povas, vi estas en miaj manoj.

JAKUBOVSKI (donas al ŝi ankoraŭ unu ringon, alpremiĝante al ŝi kaj ĉirkaŭflatante): Vi estas al mi bona, mi amas vin ne nur de hodiaŭa tago. (Ĉirkaŭprenas ŝin denove.)

FRIDA (parolas rapide kaj mallaŭte): Nu aŭskultu, se vi min tiel amas: povus okazi, ke Maija kontraŭstaras al vi per ĉiuj fortoj kaj vi sola ne sukcesos; povas okazi ia malfeliĉo. Tiam vi devas la suspekton forigi de vi — kaj pli bone la suspekton direkti al Heil, — ĉiuj scias, kiel ĵaluza li estas.

JAKUBOVSKI: Bone, bone, — kiel ĝin fari?

FRIDA: Ankaŭ tion vi sola ne povas efektivigi: mi akiros la ĝardenhakilon de Heil — la saman, per kiu li vin minacis kaj de kiu vi ektimis kaj forkuris.

JAKUBOVSKI (en honto kaj kolero): Diablo vin prenu! Kial vi tion rememorigas?!

FRIDA: Mi devas rememorigi, ĉar la hakilon mi povas ricevi kaj ĝin oni metu en la lokon, kie ili kutimis renkontiĝi, kaj kien nun vi iros anstataŭ la atendata Heil.

JAKUBOVSKI (ekscitita, en atendo): Ha! ha! — Kie do estas tiu loko? Kie ĝi estas? Nu! nu!

FRIDA: La lokon mi scias kaj kiam vi ĝin bezonos, mi diros, sed ne pli frue!

JAKUBOVSKI: Diabla virino!

FRIDA: Nun vi vidas, kion vi perdis, postkurante vian Maija, kiu vin ne deziras.

JAKUBOVSKI (karesante): Nu, nu, vin ja mi ĉiam deziris kaj deziras. Mi koleriĝas nur pri la spitemo de Maija. Kion ŝi ekkuraĝas? Ŝi faris al mi tutan predikon — pri venko de la bono kontraŭ la malbono. Mi deziras montri al ŝi la malsaĝon de la homoj. Ŝi deziras venki min — malnovan militiston. Ŝi estas ia sorĉistino kaj fidas al siaj sorĉvortoj. Sed kontraŭ ŝiaj sorĉaĵoj mi ricevos pli fortajn sorĉvortojn de la diabla groto.

FRIDA (moke): Heroo! Standardjunkro. Timulo vi estas! Simpla knabino, kiel ĉiuj knabinoj: ŝi havas pli bonan fianĉon ol vi estas, ĉar vi postkuras ĉiujn knabinojn. Sed se vi Maija'n akiros, tiam Heil kun ŝi plu ne edziĝos, kaj tiam Maija mem venos al vi. Tiam vi povos en proksimeco vidi, kian sorĉforton ŝi havas.

JAKUBOVSKI: Mi iros skribi la leteron kaj vi zorgu pri la plua. (Forrapidas.)

FRIDA (vokas post li moke): Jen, amanto mia juna, vi forgesis je adiaŭo eĉ ĉirkaŭpreni kaj kisi min.

JAKUBOVSKI: Kisu la juvelojn kaj la perlojn. (Foriras.)

Kurteno

TRIA BILDO

Groto de feinaĉo
Malluma ejo. Malgranda fajreto sub tripiedo

UNUA SCENO

Feinaĉo. Venas Jakubovski

FEINAĈO (duonkantante, manipulante ĉirkaŭ la fajro, kirlante en kaldroneto sur la tripiedo):

Mi sorĉas, sorĉas, sorĉas
Kion mi en manoj tenas —
Mi sorĉas, sorĉas, sorĉas
Kion mi en manoj tenas —

JAKUBOVSKI (venante antaŭen, surprizita, mallaŭte): **Ha! ŝi diris la samajn vortojn! Ankaŭ Skudritis estas ilin aŭdinta.**

FEINAĈO:
Kion mi en manoj tenas,
Jen, al ĝi la fajron
Ekbruligas mi turmentan —

JAKUBOVSKI (mallaŭte): **Ha! ha! ankaŭ ŝi estas feinaĉo! Ĉiuj havas la saman kanton — turmentan fajron — jes, ŝi estas bruliginta tion al mi —**

FEINAĈO:
Kanton vi ne rompu
Kanto pikos vin —
Turmentfajron faras mi
Pikas mi per morto ĝin.

JAKUBOVSKI: Kial vi, sorĉistino, min timigas? Jen, ricevu bonan monon, destinu al mi bonan sorton! (Li ĵetas al ŝi orpecon.)

FEINAĈO:
Ora ligno flamon
Altenblovos nun. —
(Fajro sub la tripiedo subite supreniĝas, en la ekflamiĝado ĉe muro vidiĝas skeleto.)

JAKUBOVSKI: Ha, kio vidiĝis tie kvazaŭ skeleto? Nu, destinu al mi feliĉon!

FEINAĈO:
Mi ne destinantin',
Mi nur servistin'.

JAKUBOVSKI: Kiu do destinas?

FEINAĈO:
Feliĉdestinantin'
Estas la patrin' —
Kion vi scivolas?
Ĉu vi ore brilas?

Diabla groto

Antaŭ ĝi anoj de Riga Esperanto-societo, ekskursintaj tien somere 1923. En I. vico de maldekstre: 1. sinjorino K. Indra, 2. T. Indra, ĉefdelegito de UEA, 3. E. Grot, lingva komitatano, 7. Ints Ĉaĉe, tradukinto de ĉi tiu libro; malantaŭ li A. Krauze, prezidanto de Latva Esperanto-societo en 1933

JAKUBOVSKI (ĵetas ankoraŭ orpecon): **Ĉu mi atingos, kion mi deziras?** (La fajro denove aeren supreniĝas, ankoraŭ pli alten, kaj nun vidiĝas apud la skeleto sabro.)

FEINAĈO: **Alten fajro flamiĝadis,**
Pli akiros vi ol volis.

JAKUBOVSKI (triumfante): **Ha! ha! mi vin venkos! Mi vin akiros! mi vin akiros!** (Ektimante.) **Kion signifas la sabro apud la skeleto? — Ha, mi venkos la morton per la sabro. La sabro estas pli forta ol ĉio. — La malbono venkas! — Kion vi diras, sorĉistino?**

FEINAĈO: **La malbono ĉion venkas,**
Sin mem brulvarmigas —
Kiu estas findiranto — ? —

JAKUBOVSKI: **Ho! ho! Mi la finon diros! Mia vi estos! Mi vian sorton destinos, vi, la fiera! Vi, la sankta! Ha! ha! ha!**

FEINAĈO: **Destinitan vi hodiaŭ faros,**
Sed jam morgaŭ vi mem mortos —

JAKUBOVSKI (en timo kaj kolero): **Kial vi min konfuzas, sorĉistino?! Kial vi denove pri la morto parolas? Ĉu ne sufiĉe vi la oron ricevis?! — Prenu ankoraŭ! prenu ankoraŭ! prenu ankoraŭ!** (Li ĵetas tri foje po orpeco kaj trifoje supreniĝas, ĉiam pli alten, la flamo de la brulŝtipetaro. Sur la muro montriĝas skeleto, sed nun ĝi tenas en la mano sian kapon. La sabro estas sangomakulita.)

JAKUBOVSKI (ektimas, sed poste malapatiiĝas, sin mem trankviligante): **Jen tiel! la sabro estas sangokovrita! kaj memkompreneble, fluu la sango de tiu, kiu kontraŭstaras min! Denove tie la skeleto! Nun ĝi tenas mem sian kapon en la mano! De mi venkita! Kiu estas la skeleto? Nu, tiu estas Heil! Ha! — Oni min timigas, ke morgaŭ mi mortos! Kion?! Mi estas Adamo kaj la malnova Adamo mortas, ke la nova venkinta Adamo leviĝu! Mia spirito iĝos juna de la venko. Ha! ha! Nu, sorĉistino, montru al mi mian venkotinon! Montru al mi Maija'n!**

FEINAĈO: **Al vivulo sia flamo. —**
Flam' por flam' danĝero.

JAKUBOVSKI: **Vi ne deziras! Nu, prenu ankoraŭ monon, ke alteniĝu flamo kaj montru al mi mian akiraĵon! Mi deziras ŝin vidi ankaŭ sen ŝia deziro.** (Li ĵetas orpecojn, sed la flamo ne supreniĝas, estingiĝas la fajro, iĝas ekstrema mallumo.) **Kion ĝi signifas? Kial ne flamiĝas? Kial la fajro estingiĝis?**

FEINAĈO: **Ve! Ve! Ve!**
Flam' estingiĝas
Suferi necesiĝas,
Tranĉi! tranĉi! tranĉi!
Ve! Ve! Ve!

VIZIO (en malklaraj linioj apenaŭ rekonebla figuro de Maija pala trembriletas. La figuro de Maija estas pala, ĉirkaŭ la kolo ruĝaĵo. Rapide malaperas.)

JAKUBOVSKI (ektimas, deziras forkuri, sed ne kapablas): **Ve! kia malbona aperaĵo! — Kion signifas la ruĝaĵo ĉirkaŭ la kolo? Ĉu sango? — Ne, ĝi estas la tuketo, kiun li promesis donaci kiel edziĝfestan donacon! Kia malbona aperaĵo! — Mi devas vidi ŝin vivan!** (Prepariĝas forkuri, sed ne kapablas.)

VOĈO DE LA FEINAĈO (en mallumo, mallaŭte, malrapide): **Ve! — ve! — ve! —**

JAKUBOVSKI (flustrante): **Jen! malaperis!** — (Post momento laŭte.) **Kia malbona aero estas ĉi tie! — Kion vi montras, sorĉistino? — Diablo vin prenu kun tuta via sorĉistina groto! — Mi iros vidi ŝin vivan kaj preni ŝin! — Ĉu viaj fantomoj min timigos?** (Li foriras.)

VOĈO DE LA FEINAĈO (mallaŭte, malrapide): **Ve! ve! ve!**

Kurteno

A K T O T R I A

Ĝardena teraso en plialtigita loko de la kastelo. Pli malsupre ĉirkaŭ la tuta teraso estas irejo kreskokovriĝinta de arbustoj

UNUA SCENO

En la irejo ĉirkaŭ la teraso aperas Lenjo kaj post ŝi kaŝire venas Frida

LENJO (per neaŭdeblaj paŝoj preterkuras laŭ la irejo, rigardante supren. Mallaŭte al Frida, ŝin alkurante): **Ŝi ankoraŭ ne estas elirinta. Tuj Maija devas eliri terason. Heil ankaŭ estas tie ĉe ŝi. Ŝi jam vestis sin per la fianĉinvesto, por montriĝi al Heil, kia ŝi estos ĉi vespere. Kiom bela ŝi estas kiel fianĉino! Oni tute ne povas satrigardadi ŝin.**

FRIDA: **Ne babilu absurde! Oni vidis ankoraŭ pli belajn. Rigardu nur, ĉu ŝi eliras. Ĉu gardistoj ankaŭ estas, ke Jakubovski ŝin ne forrabu.**

LENJO: **Estas, estas gardistoj. Eliros, ŝi eliros, se mi al vi diras. Sed ŝi ja estas pli bela ol ĉiuj, ĉiuj!**

FRIDA: **Iru ankoraŭ foje rigardi, ĉu ŝi eliris? Kaj ĉu ŝi estas sola?**

LENJO (kuretas denove. Mallaŭte): **Estas, estas, ĵus ŝi eliras. Heil ankaŭ estas kun ŝi.**

FRIDA: **Bone, vi restu ĉi tie, mi tuj revenos.** (Foriras.)

DUA SCENO

Supre sur la teraso, tra kastelpordo elirante, aperas Maija kaj Heil

MAIJA (en fianĉinvesto, gaja, petolema): **Jen estas mi por vi, mia kara! Tia mi estos ĉi vespere kiel fianĉino, kiel via fianĉino antaŭ ĉiuj homoj! Nun mi estas fianĉino, sole de vi rigardinda. Vi la unua devas vidi min, antaŭ ol ekvidas min okuloj de popolanoj. Nur por vi mi ornamas min, por vi, kiu estas la unua kaj la lasta. Mi mem elektis vin kaj neniu havas rajton je mi kaj neniu povas min preni perforte. Nur al vi mi donas min libervole kaj por la tuta vivo!**

HEIL: **Mia kara, mia neforprenebla! Mi kredas vin, mi adoras vin; pene, tre pene mi vin deŝiras de la malbona mondo. Mi tremas kaj skuiĝas pro vi. Tian timon mi havas. Pli baldaŭ, pli rapide mi dezirus preni vin en miajn manojn, ke neniu kuraĝu vin de mi forpreni. Ke la geedziĝfeston ni povus ankoraŭ pli rapidigi, — ne ĉi vespere, sed tuj, ĉi posttagmeze.**

MAIJA: Ĉu tiam vi estus pli trankvila, se la geedziĝfesto estus jam okazigita. Ĉu la geedzigo kaj fremdaj vortoj de pastro havas por vi pli grandan signifon ol miaj vortoj? Vortoj de via fianĉino?

HEIL: Jes, jes, tiam mi estus pli kuraĝa, tiam neniu alia havus rajton je vi, krom sole mi. Tiam la sankta leĝo defendus min.

MAIJA (ridas): Ho vi mia kara timemulo! Tiel timema estas tiu, kiu min gardas kaj defendas! — La sankta leĝo! — Ho, mia vorto, mia koro, mia amo je vi estas pli sanktaj ol ĉiuj leĝoj. Tie mia amo defendos vin pli multe ol ĉio. Se ĉiuj leĝoj estus sur via flanko kaj mia koro tie ne estus, tiam vi estus sola kaj restus sola. Sed mi vin ŝlosis en mia koro de la unua momento, kiam ĝi malfermis siajn pordeton kaj fenestreton, por enlasi suneton, por enlasi vin. Ho, kian timon mi havis, kiam la unuan fojon malfermiĝis la fenestreto! Ho, kiel mi timis de la tuta fremda mondo! Ia interna voĉo al mi flustris: ne malfermu, ne malfermu la fenestreton! Kion vi ekvidos, tio estos terura! Vivaj homoj ne estas tiom bonaj kiel malvivuloj!

HEIL: Kara, mia kara, ne parolu pri mortintoj! Mi abomenas paroli pri ili! mi, aŭdu, havas malbonan antaŭsenton!

MAIJA: Nu jen, vi ĉiam al mi riproĉis la timon kaj antaŭsenton, kaj nun vi mem timas.

HEIL: Mi ne scias, kio kun mi hodiaŭ okazis. Ke la tago pasu pli baldaŭ! Ke ni pli baldaŭ estu geedzigitaj!

MAIJA: Mi hodiaŭ estas pli feliĉa ol timema. Mia fenestreto estas malferminta ĉiujn siajn kovrilojn kaj vidas vin. Jen, mi komencis al vi rakonti kian timon mi havis, sed kiam mi ekvidis vin kiel la unuan, tiam mi de vi ne timis. Mia animo, kiu eterne silentadis, ĝeniĝeme ion flustris.

HEIL (ĉirkaŭbrakas ŝin): Mia kara, mia sola, mia ununura vivo.

MAIJA (delikate forvolviĝas el liaj manoj kaj dancpromenante, mallaŭte kantas):

Nokte parolas floroj,
Tage la folioj,
Burĝonoj timeme
Flustras dum aŭror'.

Kvankam nun tagas,
Vin mi ne timas —
Burĝon' ekfloras
Renkonte al vi!

HEIL: Ho, kiel bele estas, kiam vi kantas kaj dancas! vi estas kvazaŭ floro, kiu liberiĝis de la tero kaj flugas surtere, vi estas kvazaŭ estaĵo de alia mondo! Vere, vi pravas, ke vi ne estas de niaj terinfanoj.

MAIJA (same duonkantante, duondancante):

Per sekiĝintaj mamoj
La patrino min nutris

Per rigidaj manoj
La patro min vartis,
Ĉiuj najbaroj
Ridetis rikane
La feino haltis
Min supren levis,
Fordonis al vi:
„Prenu kaj gardu!“ (Ŝi ridas.)

HEIL: Ĝojige kaj terure samtempe estas aŭskulti kaj rigardadi vin! Mi, verdire, ĉiam havis timon en via proksimeco. Vi estas tiom fremda kontraŭ ĉio, kion mi konas. Por aliaj vi estas same stranga, kiel al mi. Vi min altiras al vi tiom nekontraŭstareble, sed mi neniam estas certa, ke mi vin povus reteni. Tutan mian estaĵon vi aliigas kaj kurbigas, mi iĝas necerta al mi mem, mi ekbalanciĝas kiel floro en vento. Kaj tamen al mi ŝajnas, ke mi staras pli firme en la tero ol iam ajn. Kiam vi kantas, ankaŭ mi kantemas, kiam vi timas, tiam ankaŭ mi havas timon. Sed kiam vin mi ne havas, tiam mi sentas min kiel trudherbo, kiu estas elsarkita el florbedo kaj metita sur vojrandon. Mi estas orfo kaj al vi mi la unuan fojon alvenis hejmen . . . Vi estas kvazaŭ bonodoro, kiu vastiĝas tra tuta ĝardeno kaj tamen mi bone scias, kie kreskas la rozo, de kiu venas la bonodoro. Kaj kiom ajn malproksimen vastiĝus la bonodoro, la rozo staras sur loko, al ĝi mi povas fidi.

MAIJA: Nu, se ankaŭ vi kantemas kiam mi kantas, tiam kantu do nun, dum nia ĝojtago, dum nia geedziĝtago!

HEIL (duonkantante):

Suno karesas kapon,
Luno karesas koron,
Suno donas rozojn,
Luno — la liliojn.
Suno igas nigra,
Luno igas blanka,
Suno en ĝardeno,
Forte min varmigu!

MAIJA: Mia kara, la unuan fojon mi aŭdas, ke ankaŭ vi kantas. Vi estis tiel silenta, kiel la floroj en via ĝardeno.

HEIL: Vi elburĝonigis la florojn en mia ĝardeno, al mi restas nur kolekti la florojn, kiuj ĉiu bonodorante kantas.

Kial kanton mi ne kantu,
Se mi scias kantojn trovi:
Ŝi la harojn flirtigadis,
Kantojn zume sonigadis
Mi la kantojn kolektadis
Kaj ĉe brusto konservadis.

MAIJA (ridante): Jen kia vi estas! jen, al kio vi inklinon havas! Mi tute ne sciis!

HEIL: Ĝi estas al mi mem la unua fojo. Unuafoje mi senton de feliĉo sentas; mi feliĉon ne konis, vi estas mia feliĉo; hodiaŭ

ŝajnis al mi, ke la feliĉo estas proksime, mi ekaŭdis ĝian voĉon kiel kanton. Sed mi ektimis de la feliĉo, ĉu mi ĝin retenos? — Kaj kune kun la feliĉo foriros ankaŭ la kantoj. Al mi ŝajnas, ke ĉi tiu mia nuna kanto estos ankaŭ mia lasta. — Mi aŭdis la kanton kvazaŭ malproksiman rememoron de la infanaĝo kaj ŝajnis al mi, ke mia rozo estus ĝin kantinta.

MAIJA: Vi — ĝardenisto,
Mi estas rozo!
Faru kun mi
Laŭ via plaĉo!

Tondilon almetu,
Por tranĉi min,
Mi sentas manon
Tenantan min.

Tranĉu, mi mortos,
Anim' mia restos
Vin kiel bonodoron
Amege karesos.

MAIJA (subite eksilentas, tiam rapidas al Heil kaj vive lin ĉirkaŭbrakas).

HEIL: Via kanto estas tiel ĉarma kaj bela, kiel via animo, sed tiel malgaja kaj plena de antaŭsentoj kiel morto. — Ĉu vi tion ne aŭdis?

MAIJA (apogpremiĝas al li ankoraŭ pli proksimen).

TRIA SCENO

Malsupren venas Lenjo, post ŝi Frida kaj Jakubovski; ĉiuj iras mallaŭte kaj kaŝiĝeme, ekhaltas kaj aŭskultas

HEIL (al Maija): Vi tremas, mia kolombeto! Ne, ne, kolombeto, — vi vere estas kvazaŭ rozo, ankaŭ rozo ektremas, kiam oni deziras ĝin ŝiri. Sed mi ja ne deziras vin ŝiri.

MAIJA (ektimas): Iu estas tie malsupre! — Ŝi vokas kaj kliniĝas trans barilrandon; Frida kaj Jakubovski retiriĝas.) Kiu estas tie malsupre?

LENJO: Tio estas mi. Ĉu vi ektimis, Maija?

MAIJA: Kial vi kaŝiras tie malsupre? Mi vere ektimis; nun ja vagadas diversaj homoj.

LENJO (ridas): Kial vi tuj ektimis? Sed min vi riproĉas, ke mi estas timema. Ĉi tie ja estas neniu.

MAIJA: Ĉu vere neniu estas? Al mi ŝajnis. — Kion do vi deziris? Kial vi kaŝiris?

LENJO: Mi deziris iri al vi; ĉu vi permesus?

MAIJA: Kial do vi ne venis?

LENJO: Ĉe vi estas sinjoro Heil.

MAIJA: Li baldaŭ foriros, tiam vi povas veni. Sed kial vi en la ravino kaŝiĝis? Vi povis veni tra la pordo por demandi.

LENJO: Mi baldaŭ revenos. (Foriras post la arbustoj.)

KVARA SCENO

Maija kaj Heil

MAIJA: Mi terure ektimis! — Ĉu ankoraŭ iu ne estis tie malsupre?

HEIL: Vi opinias — li? Li ja povas nun fari nenion plu, ol sekrete rigardadi kaj aŭskultadi nian feliĉon. Vin li nun ja neniam ricevos. — Ha, ha, ha!

MAIJA (alrapidas lin kaj ĉirkaŭbrakas): Ne ridu, Viktoro! Estas tiel malserene en mia koro.

HEIL: Ne timu, mia rozeto, ne tremu! Nu kion li povas fari?! — Sed kial la malgranda Lenjo tiel ĉie ĉirkaŭvagadas! fiknabineto, sekrete aŭskultas kaj interflustradas kun ĉiuj.

MAIJA: Vere, fiknabino, sed ŝi min tre amas kaj deziras al mi bonon. Kvankam strangmaniere, kiel ŝi tion komprenas. (Alfleksiĝas al Heil.) Ho, multaj min amas, sed mi havas nur timon de tio!

HEIL: Ne tremu, mia rozeto. Kion li povas?! Mi havas pli multe da amikoj ol li. Svedaj soldatoj min gardos. Sinjorino Ŝildhelm rilatas al mi bone. Ĉiuj popolanoj simpatias al ni. Vin ĉiuj tiel amas, ke neniu permesos kaŭzi al vi maljuston.

MAIJA (karese): Jes, vi havas multajn amikojn kaj ankaŭ multe da amikinoj; ekzemple kiom Frida vin dezirus.

HEIL (ekmoviĝas malpacience).

MAIJA: Ne maltrankviliĝu, mia kara! Mi nur ŝercas. Mi emas ankaŭ ŝerci, kiam estas tiel timige. Al vi mi venas por trovi ŝirmon, ĉe vi ripozi. Ĉe vi estas tiel bonege. Venu ĉi tien, ni sidiĝu iomete. Mi deziras al vi kanti ankoraŭ iun kanteton! — Venu ĉi tien pli proksimen al barilo! Kune kun vi mi timas neniun! (Ili sidiĝas apud la barilo.)

MAIJA (kantas mallaŭte, kiel lulkanton):

La koro laciĝis
De l' taga bruo,
Mi plu ne povas.
Elteni ŝtonardon.

Ĉe vi estas bone, —
Silenti mi povas,
Vi mia korkusen'
Por ripoz' en dolor'.

(Ŝi kliniĝas kaj metas sian kapon en lian sinon — poste laŭte): Karulo! Karulo!

HEIL (time): Ve! Ke nur iu ne aŭdu nin?!

MAIJA (senzorge): Oni aŭdu! Aŭskultu ĉiuj: vi estas mia karulo! Nur al vi mi apartenas, kaj neniam al iu alia! Oni aŭskultu! Oni aŭdu! Oni atentu tion kaj vane ne penu! (Subite ŝi ektimas, kvazaŭ aŭdetinta ian bruon. Aperas Jakubovski kaj deziras ion diri. Frida lin detenas. Ambaŭ malaperas denove.)

MAIJA (saltleviĝas): Ĉu tie iu parolis? Ĉu iu ridis?

HEIL (ŝin haltigante): Estis neniu, nek iu parolis, nek ridis. Vi mem nur estas malkvieta kaj vidas kaj aŭdas fantomojn. Tro ofte vi ĉiam mencias fantomojn kaj mortintojn, kaj ili ĉie viziĝas al vi. La polo ja ne venos ĉi tien, li timos mem; oni lin ne lasos netuŝita.

MAIJA: Jes, al mi ĉie vizias mortintoj, mi estas de ilia gento — (ŝi penas ridi) — mi silentos kaj ne timos. Silenti ja estas bone ankaŭ por ni, ne sole por mortintoj. La plej altan feliĉon oni ne povas esprimi per vortoj, sed per silento. Mi sentas min tiom bone! Ni silentu! Diru nenion! (Post momento time.) Ĉu vi tiel aŭdeble spiras kaj blovetas?

HEIL: Ne, ne ja! mi estas tute trankvila. Ankaŭ la silentado vin ekscitas. Pli bone ni parolu! — Ha, mi tute forgesis: mi ja alportis por vi fianĉindonacon — jen vidu! malgranda tuketo! Ruĝa kiel rozo kaj mola kiel eriifora lanugo.

MAIJA (saltleviĝas, ĝoja): Ho, kia bela tuketo. Ruĝa kiel sango — kiel fajreto! Nia hejma fajreto, en nia venonta komuna dometo! En via rozĝardeno en Sigulda! Ĉe la bela kastelo! Ĉe la belaj profundaj bordoj de Gaŭja! Ho, kia tie estos ĉiela vivado — tie estos pli proksime ankaŭ nia Bonviro kun sia ĉarma groto, kie ni tiel ofte renkontiĝis kaj kie ni rekontiĝos ankoraŭ pli ofte! Ĉu ni ne povus en tiu groto eterne resti! Dum la tuta vivo! Tie estus bele vivi, bele morti! Tie neniu homo nin malhelpus! Ni evitus la tutan mondon kaj vivus nur por nia feliĉo! Nia feliĉo finiĝus neniam, ĉar la bona koboldo nin gardus kaj trinkigus nin per sia akveto de vivo! Jes, jes! Ni iru tien tuj!

HEIL: Jes, ĉu vi scias, mi ornamis la Bonviran groton per verdaĵoj kaj floroj. Mi deziris vin konduki tien unue dum nia geedziĝtago, — sed nun pli bone ni rapidu pri la geedziĝo kaj poste ni iru tien. — Mi iros antaŭaranĝi, eble ni povus tamen sukcesi la geedziĝan solenon jam hodiaŭ posttagmeze kaj pli baldaŭ, pli baldaŭ — nur —

MAIJA: Jes, jes! Iru kaj tiam ni kuru Bonviran groton kaj kaŝu nin en feliĉon! Ho, kiel mi deziras tie esti! Mi tre deziras ridi kaj ĝoji! Mi havas tian neesprimeblan antaŭsenton, kvazaŭ mi estus fortirata ian senfinejon! — Vi, mia karulo! (Ŝi ridas.) Mein Glück und mein Heil! Mein Glück und mein Heil![1])

---

[1]) Mein Glück und mein Heil (germanlingve) — Mia feliĉo kaj mia savo.

HEIL (ridas kaj kisas ŝin).

MAIJA: **Kisu min! Kisu min! — Ne, mi kisos vin! Ĉi tiu estas mia plej bela momento!**

HEIL: **Mi tuj revenos!** (Li forrapidas.)

KVINA SCENO

Maija kaj Jakubovski

MAIJA (sola, parolas en nervoza ĝoja ekscitiĝo): **Mein Glück und mein Heil! Mein Glück und mein Heil!** (Aliras la barilrandon). **Mein Glück und mein Heil!**

JAKUBOVSKI (aperas malsupre): **Dein Heil ist dein Unheil!**[1]) **Dein Glück ist dein Unglück!**[2]) **Via Heil estas via malfeliĉo! Mi vin prenos! Mi vin prenos ankoraŭ hodiaŭ! De mi vi ne forkuros! Amo estas pli forta ol morto, vi mem diris!** (Li denove malaperas en arboj ridante.)

SESA SCENO

Maija kaj sveda gardsoldato

MAIJA (subite laŭte ekkrias kaj ŝanceliĝiras returne; poste malapatiiĝas kaj vokas): **Heil! Heil!**

(Venas gardsoldato — svedo.)

GARDSOLDATO: **Kio okazis? Kio estas?**

MAIJA (en ekscitiĝo montras malsupren): **Tien! Tien!**

GARDSOLDATO (rigardas tien, sed vidas nenion): **Kio estis tie?**

MAIJA: **Tie! Tie! — Vi voku sinjoron Heil!** (Ŝi mem vokas.) **Heil! Heil! Heil! Revenu! Venu!** (Ambaŭ rapidas en kastelon.)

SEPA SCENO

Inter arboj aperas Frida kaj aŭskultas

FRIDA: **Ektimigis la polo la kolombeton! — Atendu, mi klopodos ke vi ne estu vane timinta. Mi vin de mia vojo forŝovos. Se vi eĉ estas pli bela, mi estas pli saĝa! Vi ne forrabos de mi la ĝardeniston; li jam estis mia, antaŭ ol vi lin forlogis de mi. Venu, venu, provu nur tuŝi lin, mi lin eltiros eĉ de via amĉirkaŭbrako mem! — Ili venas!** — (Ŝi malaperas inter arboj.)

---

[1]) Dein Heil ist dein Unheil (germanlingve) — Via Heil estas via malbono.

[2]) Dein Glück ist dein Unglück (germanlingve) — Via feliĉo estas via malfeliĉo!

OKA SCENO

Maija venas akompanata kaj ĉirkaŭbrakita de Heil

HEIL: Kio do okazis? nu, parolu, mia ĉarma, mia kara! Ĉi tie aŭdas nin neniu.

MAIJA: Ĥo, nin aŭdas neniu! Mi ne scias.

HEIL: Gardistoj estas starigitaj ankaŭ malsupre.

MAIJA (duonmeĥanike): **Ankaŭ malsupre — —**

HEIL: Nu diru, kiu vin tiel ektimigis? Kion vi vidis?

MAIJA: Mi vidis — mi aŭdis — mortintojn — mi timas! mi tre timas!

HEIL: Kial vi denove vidas fantomojn, mia timulineto?! Vi timu nenion! Vi sciu, oni promesis ankoraŭ prirapidigi nian geedziĝon, tuj, post unu horo, al pastro jam estas sciigita, maksimume post du horoj. Ne timu, mia rozpetaleto! Vi infektos ankaŭ min per la timo. Estas nenio, por timi mia feliĉo! Tuj! tuj! (Heil ĉirkaŭbrakas ŝin kaj sidigas ŝin apud si sur benkon.)

MAIJA: Ne! prenu min en la sinon! Tiel proksime, proksime al vi mi deziras esti! Tenu min pli malvaste, pli malvaste, ke mi ne timu!

HEIL (sidigas ŝin en sian sinon kaj ĉirkaŭbrakas): **Mia feliĉo! Kvazaŭ de ĉielo sendita vi venas al mi! Vi mem, vi mem venas! Kvazaŭ polenereto bonodorante vi malsupreniĝis kaj mi vin tenas en la manoj, ebriĝante de feliĉo! — Mi vin tenos! mi donos vin al neniu, al neniu mi vin donos!**

MAIJA (subite ektremas).

HEIL: Ne tremu, mia kolombeto! estu kuraĝa, — baldaŭ, baldaŭ. Ripozu en miaj manoj! Ripozu ĉe mi, ĉe via korkuseneto, kiel vi mem diras!

MAIJA (momenton tute kvieta, nur de tempo al tempo ektremante. Post tio kantas mallaŭte):

Prenu min, vartu,
Ke mi trankviliĝu —
Mi tiel timas!
Prenu min, tenu —
Ho ve, mi dronas!

Prenu min firme
En fortaj manoj, —
Aŭdu — rigardu?!
Ĉu tie fantomoj,
Aŭ mortintoj moviĝas?

HEIL: Estu trankvila! Ne estas mortintoj. Kie estas tie ĉi mortintoj? Tie ĉi ĉirkaŭas nin nur belaj floroj kaj rozoj. Ili ridetas al vi. Moviĝas ne mortintoj, sed rozoj.

MAIJA (iĝas pli trankvila kaj senbrue sidas, kvazaŭ ekdormintа).

HEIL: Tiel estas bone, tiel — bone! trankviliĝu kaj plu ne timu, tiam mi povas denove iri kaj rapidigi. Mi mem rapidos al la pastro.

MAIJA (same, kvazaŭ en dormo): Ne iru! iru nenien! Nenien vi devas rapidi!

Karulo mia
Min ne forlasu,
Okuloj miaj
Kvazaŭ nubiĝas.

Mi sentas ke koro
Kvazaŭ ŝiriĝas
Kaj mi min donas,
Al naŭzo insida.

Ne forlasu, kara,
Min solan ĉi tie
Neniun tagon,
Neniun momenton!

HEIL: Sidetu, sidetu, mia ĉieleto, ripozu kiel blanka nubeto sur blua ĉielo dum tagmezo. — (Post momento maltrankvile.) Mi devas kuri ankoraŭ al sakristiano; la tajloro ankaŭ atendas min. — Mi nun iros, mia kara, ke ni pli baldaŭ estu kune por ĉiam! Mi liberigos vin de miaj manoj.

MAIJA (ne respondas, ŝi nur kantas kvazaŭ duonkonscie):

El viaj manoj ne lasu min —
Kvazaŭ ĵetita al turment' mi sentas min.
Ne levu min for el via sino —
Ŝajnas al mi kvazaŭ mordos min viper'.
Restu ankoraŭ momenton, restu!
Vi kiel luno dum nokt' al mi lumu!
Ni ne leviĝu! — mi agas senkonscie —
Mi sentas min kvazaŭ tuj mortonta.
(Ŝi ĉirkaŭbrakas febre Heil kaj alpremiĝas al li.)

HEIL: Ho ve, mia kara! — Sed mi ja devas foriri! alie ĉio prokrastiĝos, vi scias, kiaj estas niaj homoj! Nia geedziĝo per tio povas prokrastiĝi! Tiel povas — gardu Dio — okazi ĉio ajn — terure! —Ne, ne, ni rapidu, ke pli rapide ni atingu pacon!

MAIJA (kvazaŭ vekiĝante): Jes, ni devas rapidi, ni rapidu! — Mi ne scias, ĉu ni devas tiel rapidi? Pacon ni atingos nur en morto, ĉe mortintoj, ĉe mortintoj! Kial pli bone ne nomi ilin pacemuloj? Vere, pli ĝuste kaj pli bele sonas — pacemuloj.

HEIL: Ne parolu denove pri morto kaj mortintoj, pli bone ni rememoru nian amon kaj nian feliĉon en komuna estonteco.

MAIJA: Morto kaj amo estas tiom parencaj unu al alia. Forte ami estas ja morti por si kaj reviviĝi por alia. Kiu estas pli